


Laste aperis: Noktomezo



En 2010 estis eldonita fama ĉina romano *Noktomezo*. La romano estis grava rikolto en la tridekaj jaroj de la pasinta jarcento kaj unu el la klasikaj verkoj de la ĉina moderna literaturo en la dudeka jarcento.

Noktomezo estis verkita de Mao Dun (1896-1981), pioniro de la ĉina moderna progresema kulturo, granda revolucia verkisto, literatura teoriisto kaj kultura aktivulo.

Tiu ĉi libro estis elĉinigitaj de Laŭlum, honora membro de UEA, membro de la Akademio de Esperanto kaj tiu de la Esperanta Verkista Asocio. Li laboris kiel vicĉefredaktoro de *El Popola Ĉinio*, la Ĉina Esperanto-Instituto, membro de la Komisiono pri Juĝo de Kompetenteco de Altrangaj Tradukistoj, profesoro de la Ĉina Informa Universitato kaj Kolegio pri Ekonomio Interlanda. Laŭlum Esperantigis multajn klasikajn ĉinajn romanojn, inter kiuj estas *Mirrakontoj de Liaozhai*, *Ĉe Akvorando*, kaj *Romano pri la Tri Regnoj* ktp.

Noktomezo, 502-paĝa libro kun formato de 14×22 cm, estis eldonita de la Ĉina Fremdlingva Eldonejo.

Ĝi mendeblas ĉe la Distribua Fako de la redakcio *El Popola Ĉinio*, P. O. Kesto

77, CN-100037, Pekino, Ĉinio.

Telefono: +86-10-68327167, 68995930

Telefakso: +86-10-68321808

Retpoŝto: elpc@china.com

Se vi havas krediton ĉe la Universala Esperanto-Asocio, bonvolu ĝiri la pagon el via uea-konto al la konto "elpc-e" je la nomo de *El Popola Ĉinio* kaj sendi la kopion de via pag-atesto al la Distribua Fako de la redakcio *El Popola Ĉinio*, P. O. Kesto 77, CN-100037 Pekino, Ĉinio.

Prezo: 30 eŭroj (35 usonaj dolaroj); aldona sendokosto: 5 eŭroj (8 usonaj dolaroj).

Kvar Generacioj sub la Sama Tegmento



La de Laŭlum esperantigita ĉina romano *Kvar Generacioj sub la Sama Tegmento* estas eldonita. La romano estas unu el la ĉefaj verkoj de la fama ĉina moderna verkisto Lao She, kiu ricevis la titolon "Popola Verkisto" pro siaj verkoj *Kamelo Ŝjangzi*, *Tetrinkejo* k.s.

Kvar Generacioj sub la Sama Tegmento priskribas la vivon, morton kaj mizeron de Qi-Familio en Beiping, Ĉinio, okupita de la japana armeo dum la Dua Mondmilito. Per la sorto de la familio la romano montris la mizeran vivon de tiamaj ĉinoj kaj per la priskribo de ilia batalo kontraŭ malamikoj la verkisto prikantis iliajn patriotismon kaj bravecon kontraŭ la invadantoj.

En 1988 tiama Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis la alian faman romanon de Lao She *Kamelo Ŝjangzi*, kaj ĉi-jare *El Popola Ĉinio* aperigos lian alian romanon *Tetrinkejo*.

La libro kun formato de 21 x 14 cm, 1248 paĝoj havas 100 paragrafojn.

Prezo: 98 eŭroj (115 usonaj dolaroj); aldona sendokosto: 10 eŭroj (16 usonaj dolaroj)

Adr. *El Popola Ĉinio*, P. O. Kesto 77, CN-100037, Pekino, Ĉinio.

Libroaĉeteblo procezo estas la sama kiel la supredirita.



Solena inaŭguro de ŜME de 2010
 Ai Qi, ĉina junulino en la Norvegia Pavilono
 Mia vojaĝo en la ĝardeno de ŜME
 Ekologia domo de Ŝanhajo—estonteca verda vivo
 Tomiyo Yamada kaj ŝiaj tagoj en ŜME

ENHAVO

[Malfermo de ŜME] 2

Solena inaŭguro de ŜME de 2010
 Diverslandaj altranguloj en la Ŝanhaja Monda Ekspozicio

[Eniri en la ĝardenon de ŜME] 7

Ekspojnaloj de ŜME
 Ĉeftema Pavilono de ŜME
 Ponto inter Ĉinio kaj Afriko
 En la Pola Pavilono de ŜME
 "Semoj" infinitigas mian revon
 Espero— sekure bicikli ankaŭ en nia urbo

[Mi kaj ŜME] 17

Ai Qi, ĉina junulino en la Norvegia Pavilono
 Impresoj de tri ĉinaj knabinoj pri la Komuna Pavilono de Afriko
 Kuba knabino pretendanta esti ĉinino
 Mia vojaĝo en la ĝardeno de ŜME
 Koncepto de kanada junulo pri Monda Ekspozicio
 Fantazia vojaĝo de knabo el Taibej

[Verda ŜME] 28

Ekologia domo de Ŝanhajo— estonteca verda vivo
 Ideo pri malalta karbono en pavilonoj de ŜME
 Malalt-karbona kuirejo en la Sveda Pavilono
 Fronta montrado de malaltkarbona mediprotektado

[Neforgesebla ŜME] 34

Neforgesebla Ŝanhaja Monda Ekspozicio
 Ŝanhaja Monda Ekspozicio akceptis 73 milionojn da vizitantoj en 184 tagoj
 Tomiyo Yamada kaj ŝiaj tagoj en ŜME

[Pasintaj Mondaj Ekspozicioj] 38

Tabelo de la Mondaj Ekspozicioj

[E-novaĵoj de Ĉinio] 40

La Redakcio de El Popola Ĉinio

Prezidanto: Chen Shi

Vicprezidanto: Wang Xifu

Vic-ĉefredaktoro: Zhao Jun

Direktoro de traduka sekcio:

Su Yijun

Redaktoroj:

Chen Ji, Li Jianhua, Wang Lihua,

Niu Xueqin, Liu Zijia, Liu Sigong,

Zhao Xi, Li Yuwei, Zhang Xiaotong

Adreso:

P.O. Kesto 77, CN-100037, Beijing, Ĉinio

TTT-ejo:

<www.espero.com.cn>

Ret-poŝto: <elpc@china.com>

Telefono: +86-10-68327167, 68995930

Telefakso: +86-10-68321808

La Esperanta paĝo de la Ĉina

Interreta Informa Centro:

<http://esperanto.china.org.cn>

Enkonduko

De la 1-a de majo ĝis la 31-a de oktobro 2010 okazis en Ŝanhajo la 41-a Monda Ekspozicio, la unua Monda Ekspozicio en evoluanta lando.

La Monda Ekspozicio naskiĝis en 1851 en Londono, Britio, kaj de tiam cirkulas la diro: "Ĉio komenciĝas de la Monda Ekspozicio".

"Bela Urbo, Bela Vivo" estas temo de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio (ŜME). En la 184 tagoj de ŜME, 246 landoj kaj internaciaj organizoj partoprenis en ĝi kaj 70 milionoj da hom-fojoj en- kaj eksterlandaj vizitis ĝin.

Ĉi tie kunfandiĝis diversaj kulturoj kaj la orienta kaj okcidenta civilizacioj. Laŭ la temo "Bela Urbo, Bela Vivo", diverslandaj registaroj kaj popoloj plene montris fruktojn de urba civilizacio, interŝanĝis spertojn de urba evoluo, esploris novan modelon pri homaj loĝado, vivo kaj laboro, kaj liveris ekzemplojn por kreado de ekologia kaj harmonia socio kaj daŭrigebla evoluo de la homaro.

Tiu ĉi numero aperigis en si partojn de artikoloj kaj bildoj de la speciala temo "Ŝanhaja Monda Ekspozicio" de la retejo El Popola Ĉinio por montri diversajn flankojn de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio, por ke niaj legantoj povu "sperti" ĝin sen partopreno.

— La Red.





Solena inaŭguro de ŜME de 2010

La 30-an de aprilo 2010, je la 20-a horo kaj 30 minutoj, solene inaŭguriĝis la Ŝanhaja Monda Ekspozicio (ŜME) en la ĝardeno de ŜME ĉe Huangpu-rivero en Ŝanhajo, Ĉinio. Finfine okazis en Ĉinio la Monda Ekspozicio, festivalo kiu transdonas idealon de la homaro kaj en kiu kolektiĝas civilizacioj de la mondo. “Mi anoncas malfermon de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio de 2010.” Sekve de la anonco de ĉina prezidanto Hu Jintao, oficiale inaŭguriĝis ŜME. Prezidentoj kaj ŝtatestroj de dekoj da landoj, reprezentantoj el pli ol 200 landoj kaj internaciaj organizoj, kaj 10 mil ĉinaj kaj alilandaj spektantoj kune atestis realiĝon de la homa idealo kaj tiun de la ĉina revo... En la Kultura Centro de la Monda Ekspozicio ĉarmis kantoj kaj dancoj; borde de Huangpu-rivero pompis fajraĵoj kaj lumoj... Ĉiuj ĉeestantoj estis emocioplenaj. Per svingado de la brakoj kaj senĉesa aplaŭdado ili kune adresis saluton al la ekspozicio.

Fajraĵoj en la inaŭguro de ŜME



Leviĝas la nacia flago de Ĉinio, la flago de la Buroo de Internaciaj Ekspozicioj kaj tiu de ŜME.



Hu Jintao, Li Changchun, Xi Jinping, Li Keqiang, He Guoqiang, Zhou Yongkang kaj aliaj ĉinaj gvidantoj en la malferma ceremonio de ŜME



Ĉina prezidanto Hu Jintao anoncas la malfermon de ŜME.



Japana kantisto kantas “Stelon”.



Jonathan Buck kaj Siedah Garrett kune kantas “Better City, Better Life” (Bela urbo, bela vivo), la himnon de la Monda Ekspozicio.





Ĉina pianisto Lang Lang ludas "ŝanhajan koncerton".



Sud-afrika ĥoro prezentas "Unu amon".



Itala blinda tenoro kaj ĉina knabino kune kantas "Ĉi-nokte neniu dormas".



"Kunligo de la koraj kaj la manoj"



Jackie Chan, internacie fama filmo-stelo el Hongkongo, Ĉinio, kune kun alilandaj infanoj-artistoj sur la scenejo.

Diverslandaj altranguloj en la Ŝanhaja Monda Ekspozicio

Diverslandaj altranguloj flugis al Ŝanhajo por ĉeesti al la tago de siaj naciaj povilonoj en la Ŝanhaja Monda Ekspozicio, kie ili fervore prezentis al la vizitantoj sialandajn eksponaĵojn kaj intense aranĝis diplomatajn renkontiĝojn kaj dialogojn.



La 23an de majo, sveda reĝo Carl XVI Gustaf en la Sveda Pavilono



La 27an de majo, finnlanda prezidento Tarja Halonen en la Finnlanda Pavilono



La 15an de majo, ministra mentoro de Singapuro Lee Kuan Yew funkciigas muzikskatolon en la Singapura Pavilono.



La 18an de majo nederlanda kronprinco Willem-Alexander kaj lia edzino ĉeestis la tagon de la Nederlanda Pavilono.



La 1an de majo prezidento de la Korea Respubliko Lee Myung-bak kaj lia edzino vizitis Pavilonon de Koreaj Entreprenoj kaj la Pavilonon de la Korea Respubliko.



La 22an de majo ŝtata sekretario de Usono Hillary Clinton vizitis la Ĉinan Pavilonon kaj diris, ke ŝi preferas koloron de blua talismano Haibao.



La 21an de majo aŭstria kanceliero Werner Faymann en la Aŭstria Pavilono




La 28an de majo, norvega kronprinco Haakon respondas demandojn de ĵurnalistoj en la Norvega Pavilono.



La 20an de majo germana prezidento Horst Köhler en Pavilono de Bremen-kazo en Areo de Urba Praktiko



La 30an de aprilo franca prezidento Nicolas Sarkozy kaj lia edzino en la Franca Pavilono



Ekspoj haloj de ŜME

Scienc-teknologio kaj ekologio estas akcentataj de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio (ŜME) en 2010. En konstruado de la ĝardeno de ŜME oni uzas grandkvanton da novaj sciencoj kaj teknologioj, novaj fueloj kaj novaj materialoj. En diversaj konstruaĵoj enkorpiĝas scienc-teknologiaj kaj kulturaj fruktoj ekspozitaj en ŜME. Ili montras novajn ideologiajn tendencojn en la konstruado: fueloŝparado, mediprotektado, verdec kaj harmonio.

Ĉina Pavilono, nova simbolo de verdec

La Ĉina Pavilono konsistas el la nacia halo, lokaj haloj kaj Hongkong-a kaj Makao-a haloj. La nacia halo kun leviganta firsto kaj elstaraj aleroj portas la nomon "Orienta Ĉapelo", kaj plastike enkorpiĝas la nacian spiriton kaj ideon de Ĉinio; la lokaj haloj horizontale etendiĝas kaj reliefigas la nacian halon per sia disvolvita platformo. La nacia kaj lokaj haloj harmonie kontrastas unu kun alia kaj kune evidentigas la temon de la konstruaĵo. Post ŜME la Ĉina Pavilono restos kiel konstruaĵo konservata.

En konstruado de la Ĉina Pavilono, oni aplikis novajn teknologiojn por mediprotektado. Unue, la nacia halo de la Ĉina Pavilono havas etaĝojn pli kaj pli larĝajn unu super alia de la bazo al la supro, tiel ke en somero la supraj etaĝoj povas ŝirmi la malsuprajn kontraŭ

sunradioj, kaj tio tre utilas al energi-ŝparo. La lokaj haloj havas vitrajn murojn por la ekstera koridoro, tiel ke per pasiva energi-ŝpara teknologio oni povas garantiigi al la haloj varmon vintre kaj aerumadon somere; kaj la ekologiaj agrikulturaj vidaĵoj sur la tegmentoj de la lokaj haloj povas funkcii kiel efikaj varmo-izoliloj.

Due, en konstruado de la Ĉina Pavilono oni faris multon en la arkitektura projekto por efektiviigi ellaso-redukton kaj energio-ŝparon pere de novaj teknologioj mediaj kaj energiaj, ekz., ĉiuj ĝiaj dutavolaj vitroj estas energi-ŝparaj. Elektron ŝparas ankaŭ la ekipaĵoj de glaciofarado en la Ĉina Pavilono. La energi-ŝpara sistemo de la pavilono reduktas energi-konsumadon je 25% kompare kun la ordinara.

Trie, en la projekto de la Ĉina Pavilono oni plenplene konsideris pri energi-ŝparado kaj mediprotektado. La konstruaĵo ne nur estas bone aerumata, sed al ĝi oni ankaŭ uzas multajn sun-energiajn teknologiojn. Engiaj tegmentoj kaj eksteraj muroj estas instalitaj la sun-energiaj baterioj, dank' al kiuj oni espereble realigas memprovizadon de elektro por prilumado de la pavilono.

La sistemo de pluvakvo-kolektado instalita sur la tegmentoj de la Ĉina Pavilono plenumas cirkulan utiligon de pluvakvo, per kiu oni akvumas verdaĵojn kaj purigas stratojn. Sude de la lokaj haloj etendiĝas malgrandaj marĉoj artefaritaj, kies mempurigiveco tre utilas al ekologia medio de la urbo.



Ĉeftema Pavilono de ŜME

de JI MING



Tema Pavilono de ŜME (Foto de Feng Jin)

La Ĉeftema Pavilono estas la koro de la Monda Ekspozicio (ME), kaj ĉiuj

ĉeftemoj de la pasintaj ME-oj estis prezentitaj tie.

La Ĉeftema Pavilono de ŜME kovras 143 mil kvadratajn metrojn, inter kiuj 93 mil kvadrataj metroj estas surtere kaj 50 mil kvadrataj metroj subtere. 80 mil kvadratajn metrojn de la ekspozicia areo kovras la pavilono, kiu estas la plej granda en la historio de ME. En la pavilono la ĉeftemo de ŜME "Bela Urbo, Bela Vivo" estas eksplikita en la haloj "Urbanoj", "Urbaj Estaĵoj" kaj "Urba Planedo".

La pavilono estis dezajnita kaj konstruita de Ĉinio mem, kaj 95% de materialoj kaj ekipaĵoj faritaj de Ĉinio.

En la okcidenta ĉambro de la pavilono kun areo de 25 mil kvadrataj metroj kaj alteco de 14 metroj troviĝas neniu kolono. Tio liveris grandan dimension por montri grandajn eksponaĵojn.

Pro tio ke la ekspozicio akceptas tage 120 mil hom-fojojn, granda alero kun larĝeco de 18 metroj estis konstruita ĉe la enirejo por ke vizitantoj povu ŝirmi sin kontraŭ sunlumo kaj pluvo. Interne la temperaturo, malsekeco kaj pureco sin tenas en taŭga mezuro. Bone konsideratas ankaŭ sekureco de la vizitantoj kontraŭ fajro.

La aspekto de la Ĉeftema Pavilono alta 27 metrojn ne estas tre okulfrapa, tamen ĝi entenas multajn verdajn altteknologiajn elementojn.

Unue la sunenergia tegmento: La areo de la tegmento

kovras 60 mil kvadratajn metrojn, kaj ĝia duono estas dezajnita kiel sunenergia tegmento. Ĝi kun kapacito de 2,8 megavattoj povas produkti jare 2,8 milionojn da kilovattohoroj. Ĉiujare ĝi povas malaltigi ellason de 2500 tunoj da karbona dioksido, kio egalas planti 85 mil arbojn.

Menciinde estas, ke la sunenergia tegmento ne nur estas ornamo, sed ankaŭ konektiĝis kun elektro-reto de Ŝanhajo. Se la elektro de la tegmento superfluas, ĝi povas helpi aliajn lokojn; se mankas elektro, la elektro-reto de Ŝanhajo povas doni "sangon" al ĝi.

Due la orienta kaj okcidenta muroj: Ili kun areo de 4 mil kvadrataj metroj estas plej grandaj vertikalaj ekologiaj muroj de la mondo. En somero ili povas izoli radiojn kaj malaltigi apudan temperaturon, kaj en vintro ili povas estigi varmokonservan tavolon por malkreskigi rapidecon de vento kaj longigi vivon de la muroj. Ili ankaŭ sorbas 4 tunojn da karbona dioksido ĉiujare.

Jam en la komenco de la projektado de la pavilono oni bone konsideris ĝian uzeblecon post la fermo de ŜME, donis al ĝi pli da interŝanĝa spaco kaj ekipis ĝin per la plej modernaj telekomunikiloj. Pro tio la nova pavilono altiris atenton tutmondan kaj ricevis mendojn de pli ol 50 grandaj ekspozicioj por la jaro 2011.



Ĉina loĝdomo en la Tema Pavilono (Foto de Feng Jin)

En la Ŝanhaja Monda Ekspozicio, 2010, koridoro unu kilometron longa kaj 100 metrojn larĝa etendiĝas en la ĝardeno de la ekspozicio. Ĝi estas akso de la ekspozicio, la plej granda konstruaĵo en ŜME.

La akso estas duonmalfermita konstruaĵo. Ĝi konsistas el du etaĝoj subtere kaj unu etaĝo surtere kaj tegmento. Ene de ĝi estas belvidejo, ripozejoj, amuzejoj kaj komercaj terenoj. De tie oni povas facile iri al la Ĉina Pavilono, Tema Halaro de Pudong, Centro de ŜME, Prezenta Centro de ŜME kaj aliaj gravaj konstruaĵoj de la ekspozicio per subteraj trairejoj kaj pontaj platformoj. La akso ligiĝas ankaŭ kun la supertera promenejo traŭranta la ekspozicion de Pudong. Ĝi funkcias ankaŭ kiel trafika nodo de la ekspozicio. De tie oni povas atingi ajnan lokon de la ekspozicio.

Ĝia arkitekturo enhavas multe da scienc-teknologiaj elementoj. Kiel ekzemple:

A. Verda subtera spaco

La tegmentoj de la akso de ŜME estas strukturitaj per malpeza aer-subtena membrano. Tie la plej rimarkindaj estas 6 grandaj konusformaj "Lumvaloj", dank' al kies specialaj formoj la naturaj lumoj kaj aero verŝiĝas sub la teron, kio estas utila kaj al bonkvalitigo



Akso de ŜME, ligilo de diversaj haloj kaj parkoj

B. Aŭtomate reguligi la temperaturon de la domo

Sub la granda publika koridoro oni instalas varmpumpilon el tuboj kun longeco de 700 km, per kiu oni klimatizas la domon per naturaj energioj. Ĉar la akso de ŜME proksimas al Huangpu-rivero, la akvo el la rivero povas esti kondukita tien por reguligi tiean temperaturon.

C. Kolekto kaj uutiligo de pluvakvo

La vazformaj vitraj muroj en ĉiu lumvalo estas utilaj ne nur al bona travidebleco, sed ankaŭ al facila kolekto de pluvakvo. Granda kvanto da pluvakvo estas konservita en la subtera kelo. Post plurfoja filtrado, la konservita akvo povas esti uzata ne nur por la koridoro mem, sed ankaŭ por irigacio kaj purigo en aliaj ekspoziciejoj.

de la tiea aero kaj al ŝparo de energio. Dum ŜME tie vidiĝas ankaŭ belaj plantaĵoj.



Nacieca danco

Ponto inter Ĉinio kaj Afriko

La 16-a de junio estas la Tago de Pavilono de Respubliko Kongo en ŜME. Ĝi estas la sepa pavilonotago de Afriko post la malfermo de ŜME. Ĝis tiu tago la totala sumo de vizitantoj al la Komuna Pavilono de Afriko estis pli ol 4,5 milionoj da hom-fojoj, kaj 1/3 de la vizitanto de ŜME igis la Komunan Pavilonon de Afriko populara pavilono. La cifero ekskluzivas la sumon de vizitantoj al pavilonoj de aliaj ok afrikaj landoj ekster la Komuna Pavilono de Afriko.

ŜME ne nur rekordis la nombron de partoprenantaj afrikaj landoj, sed ankaŭ atestis la popolan interfluan inter Ĉinio kaj Afriko.

Mondpokalo furoris en la Sud-Afrika Pavilono

Vesperis. Elektronikaj ekranoj en kaj ekster la Sud-Afrika Pavilono dissendis la grupmatĉon kadre de mondopokalo de FIFA (Internacia Federacio de Futbalaj Asocioj). Multaj homoj rigardis la ekranojn kaj de tempo al tempo aŭdiĝis bravkrioj. Mondpokalo de FIFA



Sud-afrikaj kaj ĉinaj futbalaj fanoj antaŭ Sud-afrika Pavilono

unufoje okazinta en Afriko furoris ankaŭ en ĉinaj futbalofanoj.

La pavilono kun trajto de futbalo ĉiam allogis longan vicon da vizitantoj kiuj deziras fotiĝi kun la tabulo pri la ŝtata futbala teamo de Sud-Afriko aŭ Zakumi, talismano de la mondopokalo granda kiel homo.

S-ino Liang el Wuhan diris, ke ŝi estas futbala fano, kaj ŝi neniam preterlasis la Mondpokalojn. Kvankam ŝi ne povis veni al Sud-Afriko por spekti la matĉojn surloke, tamen ŝi tre ĝojis percepti la etoson en ŜME.

Pli ol cent licencitaj produktaĵoj por la Mondpokalo en ŜME estis popularaj, precipe la serio da 32 insignoj de la plej avangardaj teamoj en kosto de 850 juanoj kaj ŝtopita ludilo Zakumi en kosto de 89 juanoj. En la unua vendotago, 20 serioj da insignoj kaj pli ol cent Zakumi estis venditaj.

Tuŝi originon de homa civilizacio

Krom emociaj matĉoj, antikva kaj mistera civilizacio de Afriko inspiris la scivolemon de ĉinaj turistoj. Enirinte la Komunan Pavilonon de Afriko, oni povas vidi gigantan muron "Rido de Afriko". Homara prapatrino Lucy kiel origino multigis divershaŭtkolorajn vizaĝojn sur kvin kontinentoj. Ĉiutage kelkdek miloj da vizitantoj fotiĝas tie.



Komuna Pavilono de Afriko

En la centro Si Lixin, emerito el gubernio Xishui, Hubei-provinco, detale aprecis la malnovajn metiartaĵojn el Kamerunio, Eburbordo, Togolando. Li diris: "Mi estas pli-ol-60-jara, mi ne povos fizike viziti Afrikon en futuro. Tamen mi ŝatas la eksponadon en la Afrika Pavilono. La artaĵoj estas malofte vidataj en televidaj programeroj, kaj ili rakontas la riĉan civilizacion de la kontinento."

Beninano Lulu, amikeca ambasadoro de Ĉinio kaj Afriko en ŜME, diris en flua ĉina lingvo, ke li tute ne atendas, ke oni povas vidi la integradon de diversaj afrikaj kulturoj en ŜME, kaj estas kortuŝa la pripensoj de organizantoj kaj partoprenantoj.



"Bazaro" en la Kenja Pavilono

Krom kvietaj artaĵoj, prezentado varma kaj primitiva estas alia klopodo por allogi homojn. Chen Jintian, estro de administra departemento de la Afrika Pavilono, malkaŝis, ke multaj afrikaj landoj invitis ŝtatanivelajn artistojn al ŜME, t.e. ensemblo Neba-Solo de Malio, kiu plurfoje monde turneis, Cesaria Evora de Kabo-Verda, kultura vilaĝo Manyatta de Kenjo ktp.

Kunporti Afrikon hejmen

Kiel parfumo el Franca Pavilono kaj ŝuoj UGG el Aŭstralia Pavilono, afrikaj metiartaĵoj estas nepre aĉetendaj por ĉinaj turistoj. Budoj kiuj vendas pezajn ebonoskulptaĵojn, manfaritajn trikotojn Kubabu, bidkolĉenojn kun troiga formo, diverskolorajn orelingojn, ĉiam estas ĉirkaŭataj de scivolemuloj.

Junaj geedzoj el Zhejiang "maltimeme" provis tatuadon de Maŭritanio. La koloro farita el plantoj estis ŝmirita sur haŭto kaj malaperinta post du semajnoj.

Edzo Lü Yaobin diris, ke li konis malmulton pri Afriko. Li televidis pejzaĝon sur la stepo el la programero "Animala Mondo", kaj konis novaĵojn pri militoj kaj malsatego en Afriko. Ĉi-foje ŜME malfermis lian vidkampon kaj malkovris al vizitantoj la alian riĉan flankon de Afriko.

Por ke ĉinaj turistoj bone konu Afrikon, ŜME publikigis du librojn *Eksterordinara Afriko* kaj *Afrikaj Rakontoj*, kiuj ne nur konigis la trajtojn de ĉiuj afrikaj pavilonoj, sed ankaŭ rakontas la tradicion kaj historion laŭ la rakontolinio de tradicia tolo-arto, herboplektaĵo, lignoskulptaĵoj, ŝtonoskulptaĵoj, porcelanaĵoj, bronzaĵoj, maskoj kaj moderna pentrostilo Tingatinga.

Elhadi Boumaza, kuratoro de la Alĝeria Pavilono, kiu sidas ekster la Komuna Pavilono de Afriko, diris, ke lin profunde impresis la entuziasmo de ĉinaj turistoj al afrika kulturo. Li esperis, ke la pavilonoj povos doni bonan impreson al ĉinaj vizitantoj, kaj ili vizitos Afrikon iam estonte.





En la Pola Pavilono de ŜME

de CHANG ZHENG



Enirinte en la primitivan kaj elegantan Polan Pavilonon oni povas vidi multajn elementojn similajn al la ĉinaj. Krom papertranĉaĵoj tie videblas ankaŭ polaj drako viva aspekte, ĝiaozi-oj kun loka trajto kaj urbaniza procezo simila al tiu de Ĉinio. Intervjuate de la retejo de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio, Slawomir Majman, ĝenerala reprezentanto de la Pola Pavilono, rakontis specialajn historiojn pri Pollando.

La pavilono troviĝas en la zono C de la ĝardeno de ŜME. Ĝi havas eksterajn murojn kun desegnoj de papertranĉaĵoj. En la pavilono per televidaj ekranoj oni montras vivŝanĝiĝojn de poloj kaj ilian transloĝiĝon de kamparo al urboj, kaj eksplikas la ĉeftemon de ŜME "Bela Urbo, Bela Vivo" per la temo "Rideto de Pollando".

Nuna Pollando

En la unua eksponejo de la pavilono la eksponaĵoj kun papertranĉaĵoj kiel fono montras helpe de lampoj klimatajn ŝanĝiĝojn en kvar sezonoj kaj naturajn scenojn en la kamparo. Slawomir Majman diris, ke la eksponaĵoj

prezentas statojn de poloj en loĝado, laborado, lernado, kulturo kaj aliaj flankoj.


Veturi al metropoloj per trajno

En la dua eksponejo oni povas vidi fenestrojn de vagonoj plastike el papertranĉaĵoj. Ĉiu fenestro montras per video polajn dancojn kaj muzikojn, elekton de polaj belulinoj kaj aliajn scenojn pri moderna vivo de poloj, iliajn grandajn atingojn en la pasinta historia periodo.

Slawomir Majman fiere diris, ke Pollando estas eŭropa lando havanta sian propran pensfadenon pri disvolviĝo, kaj ankaŭ tre interesa lando. Per la video mi informiĝis, ke Pollando jam fariĝis unu el la 20 landoj plej riĉaj en la mondo. Polaj popolanoj vivas trankvile kaj laboras kontente, kaj ĉie en la lando oni povas sperti "Rideton de Pollando".

Pola drako bonvenigas vin

Krom tradiciaj popolaj papertranĉaĵoj, polaj nutraĵoj kaj popolaj kutimoj estas similaj al la ĉinaj. Slawomir Majman diris, ke ankaŭ en Pollando estas legendo pri drako kaj prezento de drakodanco. En la halo de la unua etaĝo la eltondita drako el papero sur la televida ekrano



En la Pola Pavilono



Pola drako

amuze parolas al vizitantoj: "Saluton, tiu knabino en blanka T-ĉemizo", "Tri fraŭlinoj, de kie vi venis", "Tuŝu miajn okulojn, kaj mi povos diveni, kion vi pensas"... Ĝi eĉ scias, ke mi okupiĝas pri skribado. La kialo estas, ke ĝi vidis skribilon en mia mano.

Slawomir Majman konigis, ke en la 22-a de majo, la Tago de la Pola Pavilono, okazos parado de polaj drakoj. Tiam 6 koloraj balonoj en formo de drako estos prezentitaj sur la vojo Bocheng en la ĝardeno de ŜME. Tio fariĝos brila punkto de la aktivadoj por la Tago de la Pola Pavilono.



Prezento de la trupo Rozrywka

Ludo de muzikaĵoj de Ŝopeno

Laŭ konigo de Slawomir Majman, en la Tago de la Pola Pavilono pli ol 100 polaj artistoj faros prezentadon de dancoj. Samtempe la fama pola orkestro Simfonia Luventus ludos muzikaĵojn de Ŝopeno, por memori lin okaze de la 200-a datreveno de lia naskiĝo. En la Eŭropa Placo la trupo Rozrywka prezentos dancojn en diversaj formoj, ekz. duhoma danco, baletto, moderna danco kaj Hip-Pop, per kiuj oni rakontas transloĝiĝon de kamparo al urbo.

Subĉiela restoracio

Sub la duone malfermita tegmento de la pavilono troviĝas subĉiela restoracio, en kiu la vizitantoj povas gustumi diversajn supojn, platkukojn kaj ĝiaozi-ojn en malsamaj gustoj. Slawomir Majman diris, ke multaj manĝ-kutimoj de Pollando estas similaj al tiuj de Ĉinio, ekz. ĝiaozi-o. Li proponas, ke oni gustumu ĝiaozi-ojn el Pollando.

Slawomir Majman diris al mi, ke Pollando estas amika kaj entuziasma lando. Poloj volas amikiĝi kun ĉinoj. La du landoj havis amikecon kaj similecon en la historio. Li esperas, ke ĉinoj havos en la Pola Pavilono senton kiel en sia hejmo.





"Semoj"

infiniigas mian revon

de XU JIAJUN

"Miljaraj lotussemoj, trovitaj en urbo Pulandian, provinco Liaoning, nordorienta Ĉinio, ĝermis, floris kaj fruktis post scienca kulturo, kio pruvis la persistemon de ilia vivoforto. Se la 260 mil semoj el 900 specioj en la Brita Pavilono estos bone konservitaj, ili povos daŭrigi senliman verdecon kaj vivforton," grandioza sceno de la Brita Pavilono animskuis Qiu Lin, studenton de la unua klaso de fakultato pri ellaborado de radiofoniaj kaj televidaj programoj el Ŝanhaja Filmarta Akademio, en vizito al la Brita Pavilono en la 15a de majo.

La pavilono estas malferma ĝardeno sentegmenta. Ekster la "Sem-katedralo" en la centro staras pli ol 60 mil maldikaj kaj travideblaj akrilaj stangoj. Tage ili kiel optikaj fibroj kondukas radion por prilumi la ĉambrojn, kaj nokte ili lumigas la tutan konstruaĵon.




Semoj sonĝe varias en lumo



Ripozo sur la placo de la Brita Pavilono

La pavilono petis, ke ĉinoj donu al ĝi kromnomon, kaj ĝi havas poezian nomon leontodo.

Qiu opiniis, ke la pavilono aspektas serioza. Enirante kun respekto oni perceptas la harmonion de homaro kaj la naturo kaj kontaktiĝon kun la esenca enhavo de vivoj. Kiel integri la naturon en la socian disvolvon kaj gardi plant-speciojn kontraŭ homara disvolvo postulas komunan strebadon de homaro. Semoj mem estas nerimarkindaj, tamen ili posedas gigantan povon kaj portas esperon de la homaro.



Qiu Lin rigardas la plant-semojn tra travideblaj akrilaj stangoj

"Verda urbo", "malferma urbo", "sem-katedralo", "energia urbo" kaj "malferma ĝardeno" kondukas homojn prizorgi la naturon, pensigas homojn kiel utiligi la naturon por akcepti defion de urboj.

Qiu diris: "La vivantaj semoj simbolas vivon kaj reproduktion, kaj ĉiu semo povas denove fariĝi planto. La ekzisto kaj disvolvo de la homaro intime rilatas kun plantoj. Aero, akvo, manĝaĵoj, medikamentoj, bio-energioj estas akireblaj de plantoj. Tio estas grava afero por la ekzisto de la homaro."

La semoj, veninte de la miljara sembanka projekto lanĉita de Reĝa Botanika Ĝardeno kaj Instituto pri Plantoj en

Kunming, Yunnan, estas la kunlabora frukto pri biodiverseco inter Ĉinio kaj Britio. La sembanko, estiĝinta en la 1990-aj jaroj celis kolekti plant-semojn en Britio. En la jaro 2010 ĝi konservis 10% de plant-semoj de la mondo, kaj en la jaro 2020 -- 25%.

En "energia urbo" ok veraj rakontoj kaj ok eblaj rakontoj en la estonteco pri plantoj konigas, kiel plantoj kaj la naturo konturis la estontecon de urboj, sciigis la plej novan esploron de britaj sciencistoj avangardaj monde. Qiu konsideris, ke la oriento de scienco kaj teknologio estos plue esplori la rilatojn inter homaro kaj la naturo, plibonigi la vivmedion pere de avangardaj teknologioj, kaj beligi la vivon per intimaj rilatoj kun plantoj.



Semoj sonĝe varias en lumo

Ekster la ĉeftema konstruaĵo troviĝas subĉiela areno granda kiel futbalejo. Ĝi aspektas kiel ŝirita papero, simbolanta ke britoj donacas la "sem-katedralon" al ŜME kaj amikecon inter la du landoj. Qiu diris: "Leontodo" estas semo por amikeco kunportanta esperon de la unua gastiganto de ME, kaj pavilonoj en ME estas 'semoj' disvastigantaj civilizacion, progreson kaj disvolvon mondajn."

En la jaro 1851 Londono gastigis la unuan ME. 150 jarojn poste Britio donis la mirindan dezajnon de sem-katedralo al ŜME. Respondante la ĉeftemon de ŜME "Bela Urbo, Bela Vivo" la pavilono diskonigas la koncepton pri harmonia kunekzisto de homaro kaj la naturo. La pavilono estas ankaŭ viva skulptaĵo pro la balancaj etendaĵoj.



Qiu Lin rigardas la planton "kreskantajn" sur la pak-skatoleto



Rigardo al memdigest-malkompona "estonta planto"



En "sem-katedralo"



Vizitantoj en la Sem-forma Brita Pavilono



Interparolo en la Brita Pavilono



Vizitantoj en la Brita Pavilono



Qiu Lin saltas kiel flugilo al leontodo



Espero – sekure bicikli ankaŭ en nia urbo

de CHENG MIN

En la zono Puxi de la ĝardeno de ŜME estas la Areo de Urba Praktiko de Odense-Kazoj, kie troviĝas la vojo Odense speciala por biciklado. Tie la vizitantoj povas



Provbiciklado sur la vojo Odense speciala por bicikloj en la ĝardeno de ŜME

viziti la ĝardenon de ŜME biciklante, kaj la Areo de Urba Praktiko de Odense-Kazoj portas ankaŭ la nomon “Reviviĝo de bicikloj”.

Antaŭ pli ol cent jaroj danoj konstruis en la urbo Odense la unuan vojon specialan por bicikloj. De post tiam la registaro Odense ĉiam prenas limigon de aŭto-disvolviĝo kiel gravan parton de sia laboro kaj klopodas por kuraĝigi al la civitanoj preni biciklon kiel ĉefan trafikilon. Hodiaŭ la urbo Odense kun 200 mil loĝantoj posedas pli ol 400 mil biciklojn, kaj multaj familioj havas eĉ pli ol 10 biciklojn. Ĉiuj vizitantoj al la Areo de Urba Praktiko de Odense-Kazoj en la ĝardeno de ŜME ne povas sin deteni de biciklado en la urbo Odense.

10-jara knabo Yang Yanqi estas lernanto el la elementa



Birdorigardo al la vojo Odense speciala por bicikloj en la ĝardeno de ŜME

lernejo de la Junulara Strato en la urbo Xi'an, ĉefurbo de Shaanxi-provinco en nordokcidenta Ĉinio. Li ŝatas bicikli en ĉiutaga vivo. Antaŭ nelonge li kune kun la gepatroj venis al Ŝanhajo por viziti la ĝardenon de ŜME, kaj ili restis en la urbo unu semajnon. La 7-an de majo ili speciale vizitis la Areon de Urba Praktiko de Odense-

Kazoj por sperti danan biciklon kaj ĝian specialan vojon. “Ankaŭ en la urbo Xi'an estas vojo speciala por bicikloj, sed ne en ĉiuj urboj estas. Kelkfoje biciklantoj devigite biciklas tuj ĉe aŭtoj aŭ pasantoj. Tio estas maltrankviliga,” diris Yang Yanqi.

Laboranto de la areo liveris dupersonan biciklon al li kaj lia patro. La patro kaj la filo kune biciklis nebene, kaj Yang Yanqi elektis biciklon taŭgan por li mem. La patro helpis al li porti tradician danan kaskon de sekureco por biciklado, kaj li sole biciklis sur la vojo speciala por biciklado. Laboranto konigis, ke en la urbo Odense aŭto-kondukantoj devas nepre cedi la vojon al biciklantoj, kaj krom tio, estas malpermesataj sur la vojoj de biciklado kaj pasantoj kaj kurantaj aŭtoj. “Mi opinias, ke tio estas plej sekura sen ĝeno,” diris Yang Yanqi, “kaj espereble, ke en nia urbo estos konstruitaj tiel larĝaj vojoj specialaj por biciklado, por ke ni biciklu en sekureco.”

Tamen, Yang Yanqi diris kun maltrankvilo, ke en Ĉinio multegas homoj, se ĉiuj prenos biciklon kiel trafikilon, ĉu tio ne malhelpos la laborefikon? Laboranto de la Areo de Urba Praktiko de Odense-Kazoj opiniis, ke la bono de kuraĝigo de biciklado estas evidenta. Donitaĵoj montras, ke en la pasintaj 4 jaroj la trafikaj akcidentoj reduktiĝis je 20% kaj ellaso de karbona dioksido – je 8.7 tunoj tage en la urbo Odense. La lasta elbakis la antaŭvidan planon pri trafikado, t.e. preni marŝadon, bicikladon kaj aŭtobusojn kiel ĉefajn manierojn de la trafikado. Elekti bicikladon estas elekto de sana kaj mediprotektada vivo. Tio estas neevitebla tendenco de disvolviĝo de la urba konstruado kaj homa vivo en la estonteco.

Post spertado de biciklado, la familio de Yang Yanqi pretis forlasi la Areon de Urba Praktiko de Odense-Kazoj. Kaj evidente, la knabo pensis pli multe. Li diris: “Tio, kion mi plej ŝatas en la ĝardeno de ŜME, estas ĉi tiu areo, ĉio ĉi tie estas mirinda. Antaŭe, mi ĉiam aŭdis pri mediprotektado, malaltkarbono k.a., nur ĉi tie oni povas vidi verajn kazojn.

Ai Qi, ĉina junulino en la Norvegia Pavilono

de REN YONG



Ai Qi en la Norvegia Pavilono

En la Norvegia Pavilono de ŜME mi renkontis Ai Qi, klarigistino de la pavilono, tiam ŝi estis en ruĝa uniformo kaj prezentis la pavilonon al vizitantoj.

22-jara Ai Qi naskiĝis kaj kreskis en Pekino. Post sia diplomiĝo el supermezlernejo, ŝi venis al Osla Universitato por lerni matematikon kaj fariĝis la unika ĉin-devena studentino de la fakto. En libera tempo Ai Qi rakontis Ĉinion al siaj geamikoj, kaj rapide ŝi ekŝatis la naturajn pejzaĝojn de Norvegio. Ŝi diris: “Vi tute ne povas imagi, ke ie ajn vi estus en Oslo, kaj nur post 20-minuta biciklado vi jam povus esti en arbaro. Estas mirinde, ke la urbo sin trovis en sino de arbaro.”

De post 2008, kiam Norvegio decidis aliĝi al la Ŝanhaja Monda Ekspozicio, Ai Qi delonge zorgis pri la informoj pri la preparado. Julie de 2009, el televido, sciiginte, ke la Norvegia Pavilono estas dunganta laborantojn, ŝi tuj sendis al la oficejo sian sinprezenton, kaj post du-fojaj vid-al-vidaj ekzamenoj, ŝi sukcesis en la ekzamenoj pro sia lerteco en la lingvoj ĉina, angla kaj norvegia kaj venis al Ŝanhajo antaŭ la malfermiĝo de ŜME.

Ai Qi ŝatas la konstruan stilon de la Norvegia Pavilono, laŭ ŝi la pavilono enkorpiĝis tute distingajn

vivokonceptojn de norvegoj. Anstataŭ ŝtala strukturo la Norvegia Pavilono kun 1 900 kvadrataj metroj aplikis la lignan. 15 arbo-modeloj el arbaro de Norvegio kun siaj dikaj trunkoj subportis la blankan tegmenton, oni dekoraciis la trabon per ĉinaj bambupecoj gravuritaj.

La pavilono kun temo “Donaco de la naturo” dividiĝis en 5 partojn, nome Nebulo, Marbordo, Arbaro en Urbo, Markoloj kaj Golfoj kaj la Norda Poluso, prezentante al la vizitantoj diversajn pejzaĝojn de la lando. Pri la trajto de Norvegio Ai Qi diris: “En nia pavilono anstataŭ valoraj aŭ altteknikaj ni per delikata desegno prezentas al vizitantoj la distingojn de Norvegio. Ekzemple la ŝtonetoj uzataj por pavimi la vojon de la zono Marbordo estis transportitaj de plaĝoj de Norvegio, kaj en zono de Arbaro en Urbo oni sternis la plankon per bambupecoj en arbofolia formo; kaj en la zono de la Norda Poluso oni povas vidi glacieron 10-jaran kaj spurojn postlasitajn de 3-jara polusa urso.” Fakte Ai Qi pliŝatas la noktan pavilonon. Post la 7-a vespere, “norda lumo” disverŝiĝis sur blanka plafon-volbo en la pavilono, eksonis la muziko verkita de ensemblo Sekreta Ĝardeno por ŜME kiel kuranta akvo, kaj samtempe aperis sur 110 ekranoj muzikistoj ludantaj kaj kvietaj pejzaĝoj pri la Norda Poluso, tiam la pavilono ŝanĝiĝis en “arbaron en fabelo”. Norvegio kelkfoje estis elektita de UN kiel la plej konvena porloĝada lando. En la kolektado de bondeziraj vortoj fare de la pavilono por ŜME norvegoj skribis: “Verda tero ĝojigas infanecon”, “Feliĉo signifas, ke oni povas trovi arbojn por grimpadon”, “Nia nuna agado decidis nian estontecon”...Tiuj simplaj vortoj kunportas la profundan komprenon pri la naturo kaj feliĉo de ordinaraj norvegoj. “Fakte, se ni amike traktas la naturon, ni povos vivi kiel norvegoj. Certe venos la tago!”





Impresoj de tri ĉinaj knabinoj pri la Komuna Pavilono de Afriko

de HE JUNCHANG

"Estas neatendite, ke Afriko estas tiel bela. Ĝus veninte al la Komuna Pavilono de Afriko mi estis



En la Komuna Pavilono de Afriko

ravita de ĝia beleco. La eksteraj muroj de la pavilono estas en koloroj de purpura al oranĝa. Antaŭ la pavilono staras afrika akacio verda kaj prospera. Sur la horizonto malrapide iradas elefantoj, ĝirafoj, rinoceroj kaj aliaj sovaĝaj bestoj de Afriko. La tegmentoj rondaj aŭ pintaj ŝajne rakontas historion pri Afriko..."

"En mia imago Afriko estas postiĝinta, varmega, kie furiozas epidemioj. Hodiaŭ mi vidis belan Afrikon tute malsaman ol tiun en mia imago," diris Lu Jingyi.

"Antaŭe ni havis antaŭjuĝon pri Afriko, nun ni devas forpreni okulvitrojn kun koloroj por koni rapide disvolviĝantan Afrikon," diris Chen Shuhong kaj Zhang Jing.

La 20-an de majo, tri ĉinaj knabinoj tiel babilis sub tegmentorando de la pajla dometo en la Lesota Pavilono.



Modelo pri antikvaj loĝdomoj en la pavilono

Ili estas lernantinoj de la Jiangsu-a Fremdlingva Lernejo. Ili kune kun siaj pli ol 30 samklasanoj venis al la ĝardeno de la Ŝanhaja Monda

Ekspozicio por vizitado kaj lernado.

Krom belaj naturaj aspektoj la tri knabinoj konis ankaŭ konstruadon de urboj en afrikaj landoj. En la ekspona halo "Pulso de urboj" en la Niĝera Pavilono oni povas koni urbajn formojn, riĉfontojn, loĝantojn kaj ilian procezon de urbanizo. En la eksponejo de "Kulturaj trezoroj" la blua totemo sur blankaj muroj kaj valoraj historiaj objektoj kaj delikataj metiartaĵoj atestis la 6000-jaran civilizacian historion de Niĝerio. En la eksponejo "Signo de antikvaj urboj" de la Maŭricia Pavilono estas montrataj du urboj en malsamaj formoj: antikva urbo Chinguetti sur dezerto kaj moderna urbo Nuakŝoto.

Ankaŭ afrikaj kantoj kaj dancoj estas bela pejzaĝo en la pavilono. "La prezentado kun originaj gustoj estas tre bona, vestoj kaj ornamoj de prezentantoj estas tre belaj," tiel taksis Chen Shuhong.

En la bruo de burundaj tamburoj la knabinoj eliris el la Komuna Pavilono de Afriko. Adiaŭante min ili diris: "Ni revenos denove."



Ĝojo pro vizito al la granda fendovalo de la orienta Afriko en la pavilono

Kuba knabino pretendanta esti ĉinino

de HOU XIWEN



Sierra

Sierra, kun hirtaj haroj en kariba karaktero kaj okulvitroj kun nigraj kadroj, metis pavilonan sigelon sur la pasporton de la vizitantoj, sidante ĉe la enirejo de la Kuba Pavilono. Ŝi varme akceptis la vizitantojn de la pavilono kaj laŭte diris en la ĉina lingvo: "Petu sigeladon laŭvice, laŭvice."

En libera tempo ŝi entuziasme prezentas sian nacian pavilonon: "Ĉi tie vi povas sperti ĉion de Kubo! Tie estas konstruaĵoj de Kubo, ĝiaj cigaro, kafo, koktelo kaj muziko!"

"Jam 3 jarojn mi atendis ŜME," 25-jara Sierra serioze diris al mi kun larĝe malfermitaj okuloj. "Mi ĉiam revas veni al Ĉinio."

En 1998, ŝi venis al Ĉinio kune kun sia patrino pro ŝia laboro. En Ĉinio Sierra sekvis lecionojn en la 55-a Mezlernejo de Pekino dum 5 jaroj. Kaj post sukceso en la eniraj ekzamenoj, ŝi studis kun ĝuo de la stipendio

atribuita de la ĉina registaro en la fakultato pri internaciaj ekonomio kaj komerco de la Universitato de Internaciaj Ekonomio kaj Komerco.

Diplomiĝinte el la universitato, Sierra revenis al Kubo, kaj eklaboris kiel komerca reprezentanto en telekomunika kompanio investita de Ĉinio kaj Kubo kune. Dum tiuj 3 jaroj ŝi estis ĉiam en kontakto kun ĉinoj, sed ne revenis al Ĉinio.

Sierra diris: "Mi vivis plurajn jarojn antaŭe en Ĉinio, kaj prenis la landon kiel mian propran landon. Mi lernis pere de la ĉina lingvo en lernejoj de Ĉinio, kaj multaj vortoj de la patrino lingvo forfuĝis el mi. Reveninte al Kubo, mi estis fremda por multaj aferoj de mia patrolando. Multaj homoj ŝerce diris al mi, ke mi tuj reflugu al Ĉinio."

Dank' al ŜME, Sierra havas ŝancon reveni al Ĉinio. Pro ŝia distingiĝinta elstareco en la ĉina lingvo, la kuba registaro prunteprenis ŝin de ŝia kompanio por 6 monatoj, tiele Sierra fariĝis laboranto de la Kuba Pavilono en ŜME. Tie ŝi estas tre okupita pro interpretado, sigelado kaj multaj aliaj aferoj grandaj kaj malgrandaj.

Dank' al sia kompetenteco en la ĉina lingvo, ŝi famiĝis en ŜME. Kiam Zhou Yongkang, konstanta komitatano de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj sekretario de la Komisiono de la Politikaj kaj Leĝaj Aferoj, vizitis la Kuban Pavilonon en la komenco de majo, Sierra servis al li kiel interpretistino. "Li ĉiam ĝoje ridetis, aŭskultante mian interpretadon. Fine, li diris al mi kun rideto: 'Vi bone parolas la ĉinan lingvon, kie vi lernis ĝin?' Tio ege ĝojigis min," ŝi diris.

Ŝia pekina akcento iam ĝenis ŝin dum la laboro en ŜME. "Mi kaj laboranto en la ĝardeno de ŜME jam interkonsentis telefone, ke mi iros preni varojn, sed kiam





Sierra interparolas kun vizitanto en la Kuba Pavilono

mi atingis la lokon, oni rifuzis min, ĉar oni neniel kredis, ke mi estas tiu knabino, kiu flue parolis la ĉinan lingvon kun li telefone,” Sierra diris kun rideto.

Sierra opiniis, ke por Kubo partopreni en ŜME havas profundan kaj longtempan signifon. “ŜME liveras ege bonan platformon al foraj kaj disvolviĝantaj landoj, kia Kubo, permesas al ili aktive montri sin kaj prezenti proponojn por progresado de la homaro sur tiu ĉi granda scenejo de la mondo.”

Sierra kun granda ambicio partoprenis en konstruado de Ĉinio jam antaŭlonge, sin tenante kiel mastro de la lando. Kiam ŝi studis en universitato, ŝi partoprenis oratoran konkurson por alilandaj studentoj en Ĉinio okazigitan en Pekino, kaj gajnis la unuan premion per sia prelego kun la titolo “Pekino en miaj okuloj”. “En mia prelego mi faris komparon de ŝanĝiĝo de Pekino en 1998-2005, kaj diris, ke iuj konstruaĵoj de Pekino, kiaj hutong-oj kaj kvadrataj kortoj, indas esti konservataj, sed bedaŭrinde, iuj el ili estis detruitaj,” ŝi diris.

Tio estas la 3-a fojo por Sierra veni al Ŝanhajo. Ŝi trovis,

ke Pudong de Ŝanhajo havis tiel gigantan ŝanĝiĝon ke ŝi ne plu rekonis ĝin. En ŝia memoro Pudong estas nur evoluanta distrikto, sed nuntempe tie arbore staras altaj domegoj. “Mi ŝatas plej Puxi, kie la orienta kaj la okcidenta kulturoj kunfandiĝis tiel bone ke mi eĉ ne volas forŝiri min de ĝi.”

Menciindas la amikeco inter la ĉina kaj kuba popoloj, Sierra donis abundon da laŭdoj. “Pri Kubo ĉinoj pensas nature pri kafo, vino, Fidel Alejandro Castro Ruz, flugpilko, kaj la kuba popolo estas amika al la ĉina. En mia familio la elektraj aparatoj kaj aŭto estis fabrikataj en Ĉinio.”

“Ĉi-jare venas la 50-a datreveno de diplomaciaj rilatoj inter Kubo kaj Ĉinio. Niaj rilatoj estas longhistoriaj. Pripensu, ĉinoj veturis al Kubo jam en la 19-a jarcento,” daŭrigis Sierra.

La vizitantoj de la Kuba Pavilono plejparte estis surprizitaj pri la lerteco de Sierra en la ĉina lingvo kaj sinsekve petis fotiĝi kune kun ŝi. Iuj ne povis sin deteni de scivolemo kaj demandis ŝin: “De kie vi venis efektive? Kiel bone vi parolas ĉine!”

Sierra palpebrumadis per siaj grandaj okuloj kaj respondis kun petolemo: “Mi estas ĉinino!”

Mia vojaĝo en la ĝardeno de ŜME

Kiam mi staris en ĝardeno kun profunda enspiro de freŝa aero, mi tuj refreŝiĝis, kaj bone komprenis la temon de la pavilono “Natura urbo: vivi inter la ĉielo kaj tero”!

de CHEN JI

Mia vizito al la Sveda Pavilono kun Ishii Nagato

Post kiam mi atingis Ŝanhajon, mi tuj telefonis al Ishii Nagato, japana e-isto laboranta en Ŝanhajo, por ke ni kune vizitu la ĝardenon de ŜME. Ni interkonsentis, ke post kiam mi finos mian intervujadon ekster la ĝardeno, mi renkontiĝos kun li ĉe la Sveda Pavilono.

Mi ekkonis Ishii en Pekino antaŭ 5 jaroj, kiam li lernis la ĉinan lingvon en la Pekina Fremdlingva Universitato, kaj de tiam ni foje-refoje kontaktiĝis rete.

Ishii laboras en Ŝanhajo preskaŭ 2 jarojn, antaŭ mia ĉi-foja veno al Ŝanhajo li jam vizitis la ĝardenon, tie kelkajn



Maorio gravuras sur ŝipo

pavilonojn li vizitis inkluzive de la Japana Pavilono kaj Ĉina Pavilono. Do tuj vaporigis mia plano kun li viziti la Japanan Pavilonon.

Sed fakte en la ĝardeno, se vi volas, en ĉiu pavilono vi povas trovi interesaĵojn. Kun tia kredo ni decidis komenci



Ishii (maldekstre) kaj la aŭtoro

nian viziton al la pavilono najbare de ni, kaj tiamaniere la Sveda Pavilono fariĝis nia unua vizitejo. En 2003 mi flugis al Svedio por partopreni la 88-an UK-on en Gotenburgo.

En la pavilono estas granda modelo de pulmo ŝanĝanta koloron por prezenti la malsaniĝantan procezon por atentigi homojn, ke polucio estas formordetanta homan vivon. Ĉirkaŭ la pulmo estas kvin grandaj ekspoziciaj tabuloj, sur kiuj oni de malsamaj direktoj povas vidi tute aliajn fotojn, nome de unuflanko oni povas vidi la foton kun poluciitaj lokoj, kiuj okazis antaŭ kelkdek jaroj en la lando, tamen de alia flanko oni povas vidi la saman lokon senpoluciitan, per tia frapa kontrasto la pavilono konigis vizitantojn pri la klopodoj de la registaro en regado kaj traktado de polucio en la lastaj kvindek jaroj. Mi kaj Ishii kaj miris pri la damaĝo de polucio kaj zorgas pri la mediprotektado. Kun tia forta maltrankviliĝo pri polucio ni eniris en la duan ĉambron de la pavilono.

Apenaŭ ni eniris en la ĉambron, ni tuj malstreĉiĝis pro la brila koloro de la ĉambro. IKEA per brila koloro konstruis kuirejon komfortan kaj puran, en kiu oni eĉ aranĝis ripozejon, por ke la kuiranto povu kaj kuiru manĝaĵojn kaj ripozi. Ŝajne la ideo strikte enkorpigis la temon de la pavilono “Spirito de Kreivo”. La bela kuirejo altiris al si multajn vizitantojn, kiuj haltigis siajn paŝojn kaj kaptis fotojn ĉi tie, eĉ mia kunvojaĝanto Ishii volas prove kuiru en la kuirejo.

Fakte en multaj pavilonoj de la ĝardeno oni povas persone



provi la ekspoziciaĵojn kaj sperti la novan teknikon, kaj tio estas ĝuste la ĉarmo de la ekspozicio. En la sekvanta ĉambro de la Sveda Pavilono estas ludejo kun pendoloj, kie kolektiĝis infanoj ludantaj. Rigardante iliajn ridantajn vizaĝojn, mi povas koni ilian ĝojon kaj ekkonis la spiriton de la ekspozicio -- bela urbo, bela vivo.

Ishii diris, ke li iam kortuŝiĝis pro la enhavo kaŝita en la ekspoziciaĵoj, tio vekis mian resonancon. Pli ol 200 internaciaj organizoj kaj landoj kolektiĝis en unu ĝardeno,



Stampi la pasporton pri ŜME por memoro

en unu urbo, por projekti la estontan vivon de la homaro, tie ili havas komunan deziron: per la talento de la homaro krei belan vivon, tiasence la ekspozicio estas sama kiel Olimpikoj kaj nia Esperanto-kongreso pro la sama idealo kaj deziro "Paco kaj bela vivo". Estas atendinte, ke la ekspozicio kun temo "Bela Urbo, Bela Vivo" atentigas pli da personoj kontribui por krei belan kaj pacan vivon.

Kvankam amaskomunikiloj ĉinaj kaj alilandaj inkluzive de nia retejo multe kaj detale ĝin raportis: la artprezentojn, konstruaĵojn, aktivadojn k.s, tamen kiam mi staris inter la pavilonoj tute divers-stilaj en la ĝardeno, mi evidente flaris freŝan odoron el tiuj konstruaĵoj...

Natura lando -- Novzelando

Ĉe la portalo de la Nov-Zelanda Pavilono kelkaj laborantoj sur ŝipo ĉizis dekoraciaĵojn, la bela ŝipo altiris al si vizitantojn. Oni diris, ke la laborantoj estas maorioj, indiĝenoj de Nov-Zelando. Ili estas lertaj en gravurado kaj ŝipfarado. Post du semajnoj la ŝipo finkonstruiĝos, kaj post la ekspozicio ili donacos ĝin al la Ŝanhaja Muzeo.

Apud la enirejo troviĝis granda jado pezanta 1,8 tunojn,

kaj vizitantoj ĝin trapasante kun etendiĝanta brako tuŝis ĝin. Tiu jado estas unu el la plej grandaj naturaj jadoj en la mondo. Oni informiĝis, ke antaŭ 6 jaroj la jado estis trovita de iu maoria familio en iu rivereto en suda Nov-Zelando, kaj eksponiĝis en 2005 dum la tiama Monda Ekspozicio en Aichi, Japanio. Post 6 jaroj ĝi refoje akceptis vizitantojn en Ŝanhajo. Maorioj kredas, ke jadoj kun signifo de feliĉo povas alporti al homoj sanon, pacon kaj ĝojon, kun tia kredo homoj metis la trezoraĵon ĉe la pordo de la pavilono kun la bondeziro, ke la jado alportos feliĉon kaj ĝojon al ĉiuj vizitantoj ĝin tuŝintajn.

Laŭ la koridoro mi eniris en la pavilonon. La eksponejo estas malgranda kaj simpla, oni en la kvadrat-forma ĉambro aranĝis grandajn fotojn pri verdaj paŝtejoj kaj ĝojaj infanoj, la ĉambro estas malhela, la lumo prilumis nur la fotojn, tial la belaj kaj verdaj pejzaĝoj aspektas okulfrapaj. Apud la fotoj estas kelkaj ekranoj, kiuj samtempe per funkciantaj video-aparatoj montras al vizitantoj la vivon de nov-zelandanoj: en oficejo, en hejmo, en ferioj, dum renkontiĝoj k.s. Sur la muroj de la ekspoziciejo pendas tornistroj kaj bildoj de infanoj, kaj sur la ekrano oni povas vidi la vivon de la infanoj en lernejoj. Laborantino de la pavilono Shen Jie diris al mi, ke oni per tia simpla maniero nur montras al la vizitantoj la ĉiutagan vivon de ordinaraĵ nov-zelandanoj.



Foto eksponata en la pavilono

Ĉe la fino de la koridoro estas pordo, kondukanta al la ĝardeno, kiun oni konstruis super la pavilono, tie oni plantis indiĝenajn herbojn kaj florojn de la lando, eĉ por kiel eble plej bone konservi la trajtojn de Nov-Zelando oni en ĝi "plantis" manefaritan arbon (pohutukawa). Kiam mi staris en ĝardeno, profunde enspirante la freŝan



Tornistroj de infanoj kaj iliaj pentraĵoj

aeron, mi tuj refreŝiĝis, kaj bone komprenis la temon de la pavilono "Natura urbo: vivi inter la ĉielo kaj tero"!

Labori en la ĝardeno

Mi renkontis Hunter Mcgregor en la Nov-Zelanda Pavilono. Li, nov-zelandano, du jarojn en Ĉinio lernis la ĉinan lingvon kaj laboris. Fine de aprilo 2010 li ricevis la laboron kiel akceptanto por la pavilono kaj eklaboris tie. Ĉiutage li komprenigis vizitantojn pri la kulturo, vivo de Nov-Zelando. Li diris, ke la laboro estas interesa, ĉar dum la laboro li povas renkonti multajn vizitantojn kaj amikiĝi kun ili. Kiam mi demandis pri lia plano post la ekspozicio, li diris, ke li restos en Ĉinio kaj serĉos novan laboron loke.



Hunter (dekstre) kaj aŭtoro en la Novzelanda Pavilono

Shen Jie laboras en la sama pavilono kun Hunter. Ŝi naskiĝis en Ŝanhajo, antaŭ 11 jaroj ŝi iris al Nov-Zelando por studado en universitato, diplomiĝinte, ŝi restas tie ĝis 2010. Antaŭ malfermo de ŜME ŝiaj gepatroj loĝantaj en Ŝanhajo proponis al ŝi labori por la ekspozicio. Tiam ŝi translokiĝis al la urbo Aŭklando nur antaŭ nelonge, kaj tie serĉis laboron, tial ŝi prezentiĝis al la ekzameno kaj sukcese akiris la laboron en la pavilono. Pro tio ŝi ĝojiĝis,

ĉar dum tiu tempo ŝi povas kunloĝi kun siaj gepatroj. Kvankam laciga estas la laboro, tamen ŝi ĝojas pro tio, ke ŝi povas labori por la Monda Ekspozicio en sia hejmurbo.

Fakte en la ĝardeno troviĝas kelkmil laborantoj kiaj Hunter kaj Shen Jie. Ili dungiĝis de la pavilono-posedanta lando kaj laboras en Ŝanhajo, ĝenerale ili povas paroli la ĉinan lingvon kaj konas la kulturon kaj enhavon de la pavilono. Dum akcepto de vizitantoj ili ludas rolon de kulturo-ambasadoro kaj konstruanto de ponto inter la pavilono kaj vizitantoj.

Ekster la Informa Centro mi vidis iun volontulinon montrantan direkton por vizitantoj, ŝi nomiĝas Wu Weiqin, estas 2-aklasa lernantino de Tongji-universitato, kaj de la pasinta semajno kiel volontulino servas en la ĝardeno. En la ĝardeno ĉe ĉiu kruciĝa vojo oni povas vidi volontulojn kiel Wu en hel-verda T-ĉemizo kun blanka viziero. Oni informiĝis, ke en la ĝardeno servas pli ol 5000 volontuloj, ili multe kontribuas por la bona ordo de la ĝardeno

Vizitantoj

Ĉe la ripozejo ekster la Malajzia Pavilono mi renkontis 81-jaran Lu Yuese, 74-jaran Lu Yamin kaj 64-jaran Zhang Peifang. Ili kun blankaj haroj triope evidentiĝis en homamaso. Ili diris, ke ili estas ŝanhajanoj, Lu Yuese kaj Lu Yamin estas fratinoj, ili volas kune kun la amikino Zhang vojaĝi al la ĝardeno. Hodiaŭ ili tre frue forlasis hejmon kaj fariĝis la unuaj vizitantoj de la ĝardeno. Fakte la registaro de Ŝanhajo distribuis senpagan bileton de la ĝardeno al ĉiuj ŝanhajanoj posedantaj la urban loĝantecon, tamen tia bileto validas nur en julio, kaj en tiu tempo, ili pensis, ne favoros al ili la temperaturo kaj vetero, do tial ili mempage aĉetis bileton kaj venis al la ĝardeno. Kvankam ili estas lacaj, tamen ili ĝojas pro tio, ke ili povas koni la vivon kaj kulturon de aliaj landoj.

Tie mi vidis Xu Muyuan, 8-jaran knabon, kiu kun glaciaĵo en mano, venis kun sia onklino el Taizhou, distanca de Ŝanhajo je 5-hora trajnveturado, por ili tio estas la dua-taga vizito al la ĝardeno. Hu Xueqin, la onklino de la knabo, diris, ke ili aĉetis tri-tagan vizit-bileton por la ĝardeno, en la antaŭaj du tagoj ili jam vizitis multajn pavilonojn, el kiuj profunde impresis ilin la Ĉina Pavilono, ĉar tie ili unufoje tiel proksime vidis kopion de la fama



La manfarita arbo *pohutukawa*

ĉina pentraĵo Ĉerivera Pejzaĝo de Qingming-festo.

Fakte en la ĝardeno la pavilonoj estas nur kulturo-portantoj, ĝia vera beleco sin kaŝis en la enhavo de la konstruaĵo, nur post kiam la vizitantoj komprenas ĝian veran signifon kaj kulturon, ĝi por ili estas viva, kaj la vera senco de la Monda Ekspozicio realiĝis.

Nul-ellasa aŭto en la ĝardeno

Vojaĝante en la ĝardeno mi rimarkis, ke sur vojoj kuras aŭtoj novaj, puraj kaj senbruaĵ. Oni diris, ke tiuj aŭtoj estas nul-ellasaj, tio signifas, ke anstataŭ karbono kaj similaj toksaj gasoj la aŭtoj nur ellasas akvon, kaj dank' al tio ili realigas la senkarbonan ellason.

Pri tio profesoro Yu Zhuoping, estro de la Instituto pri Aŭtoj sub Tongji-universitato diris, ke lia instituto kune kun Dinamik-sistema Kompanio pri Fuelo-pila Aŭto de Ŝanhajo kaj aŭto-fabrikejoj esploris kaj produktis fuelo-pilajn aŭtojn, kiuj prenas fuelo-pilojn kiel energion, t.e. ili utiligas hidrogenon kiel fuelon kaj oksigenon -- brulosubtenan substancon. En la ĝardeno kun areo de 5,28 kvadrataj kilometroj sin trovas 1017 nov-energiaj aŭtoj, inter kiuj 200 aŭtoj estas fuelo-pilaj.

Tamen nun pro alta produktokosto de tia aŭto, ankoraŭ estas tempo por ĝia eniro en ordinarajn familiojn. Oni antaŭvidis, ke en 2015, kiam oni trovos malmultekostan katalizilon, kiu anstataŭos la nunan, kaj konstruos sufiĉe multe da hidrogeno-stacioj, por liveri hidrogenon al la fuelo-pilaj aŭtoj, malleviĝos la produktokosto de fuelo-

pila aŭto.

Oni taksas, ke en la duon-jara ekspozicio la aplikado de novenergiaj aŭtoj en la ĝardeno povas redukti la ellason je 118 tunoj da toska gaso kaj 2,84 tunoj da forceja gaso.

Estas ekspektinde, ke tiaj novenergiaj aŭtoj sukcese eniros en la ordinarajn familiojn, la homaro per siaj talento kaj scioj fine solvos la problemojn kaŭzitajn de ellasoj karbona kaj toksa, kaj eliros el la obsedo de klimata ŝanĝiĝo.

Varma lineo de ŜME liveris servon en Esperanto

Mi eliris el la ĝardeno kaj vizitis Domon de Wenhui-xinmin-ĵurnala Grupo situantan ĉe Weihai-strato, centra parto de Ŝanhajo, tie estas oficejo de la varma lineo pri ŜME kun la telefona numero 962010, kiu liveras al la publiko servon pri informiĝo de ŜME per Esperanto.

Kiam mi atingis la oficejon, s-ro Wang Minhao, prezidanto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio, estis lerniganta Esperanton al la laborantinoj — Sinmin el Malajzio kaj Nataŝa el Rusio, eksterlandaj laborantoj de la varma lineo. Wang diris, ke ili komencis lerni Esperanton januare ĉi-jare, kaj nun jam multe progresis en parolado de la lingvo.

Pri la ideo de informo-livero en Esperanto en la varma lineo Le Di, prezidanto de la Ŝanhaja Limigita Kompanio pri Voka Centro, diris, ke kiam li estis en mezlernejo, li lernis Esperanton, tamen en sekvantaj jaroj li ne ĝin parolis. Kaj en la komenco ĉi-jare venis al li la ideo, ke li en la varma lineo liveros esperantan servon, do li surrete serĉas informojn pri la esperantisto-instruisto, kaj fine li trovis s-ron Wang. Post kelkmonata lernado en la 19-a de aprilo ekfunkciis la varma lineo en 18 lingvoj inkluzive de Esperanto. S-ro Le diris, ke li kuraĝigis la laborantojn lerni la lingvon pro tio, ke la lingvo povas helpi ilin en ilia laboro kaj riĉigi ilian vivon. Nun li planas, aldoni Esperantan servon en 96228 – varma lineo por Eksterlandanoj de Ŝanhajo, kiu estas ankaŭ funkciigata de lia kompanio.

Estas ĝojinde, ke Esperanto povas servi al la publiko en Ŝanhajo. Estas kredeble, ke kun klopodoj de e-istoj la lingvo aplikiĝas kaj aplikiĝos en pli vasta kampo.



Koncepto de kanada junulo pri Monda Ekspozicio

de WANG JIANWEI

La 22-an de junio 27-jara kanada junulo Dan Qing spektis prezenton pri naciaj artoj kaj moroj de ĉinaj oroĉen-nacio kaj heĝe-nacio. Post spektado li diris en flua ĉina lingvo: "Mi vidis objekton similan en spirito de malsamaj landoj kaj malsamaj nacioj kaj neforlaseblan historion, kvankam ĝi estas pli kaj pli malproksima de ni."

Kiam Dan Qing invitive de sia amiko vizitis la ĝardenon

de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio, tie okazis la aktivado Semajno de Heilongjiang-provinco. Sur la granda scenejo Baogang oni montris elstarajn naciajn kulturojn kaj tradiciajn popolajn artojn de Heilongjiang-provinco. Moroj kaj kulturoj de "nacio sur ĉevaldorso" -- oroĉen-nacio kaj de "fiŝhaŭta tribo" -- heĝe-nacio profunde altiris la junulon el malproksima Nord-Ameriko. Li tre interesiĝas pri montrata oroĉena loĝdomo -- lignostanga





Serĉi senton en "lignostanga domo"

domo kaj heĝeaj vestoj el fiŝhaŭtoj, kaj eĉ lernis dancon de heĝea popolartisto.

Dan Qing estas ŝtata oficisto en Otavo de Kanado. Li tre interesiĝas pri ĉina kulturo kaj eklernis la ĉinan lingvon en 2007. Antaŭ alveno al la ĝardeno de ŜME li lernis en Pekino.

"Dan Qing" estas lia ĉina nomo.

"Se mia amiko ne invitus min, mi ankaŭ venus al la ĝardeno de ŜME, ĉar mi sopiras ĝin. La Monda Ekspozicio estas granda kunveno ne nur por montri modernan civilizacion, sed ankaŭ por interŝanĝi tradiciajn kulturojn de diversaj landoj kaj regionoj," diris Dan Qing. "Indiĝenaj indianoj en Kanado similas al oroĉenoj kaj heĝeoj ne nur en vivmaniero, sed ankaŭ en aspekto. Pasintece ili vivtenis sin per ĉasado, kaj nun ili rapide adaptiĝas al la moderna vivo."



Koni faradon de metiartaĵo el fiŝhaŭtoj

Informiĝinte, ke al la Kanada Pavilono mankas montrado pri india kulturo, Dan Qing sentis iometan malesperon. Li volis iri al la Vankuvera Pavilono en Puxi-zono por trovi objektojn rilatajn al Indio. Li invitis popolartistojn el Heilongjiang-provinco tien kune iri.

La temo de la Vankuvera Pavilono estas "Kulturaj Heredaĵoj kaj Loĝtaŭga Urbo". Ekspozitaĵoj en la pavilono



Lernado de heĝea danco



Sur la premio-dona podio en la Vankuvera Pavilono

montras al vizitantoj metropolan aspekton de Vankuvero kiel "plej bona loĝtaŭga urbo en la mondo" kaj konigas ĝiajn loĝantojn kaj loĝkvartalojn. La lignostruktura pavilono, el mediprotektaj konstruaj materialoj, kaj ekspozitaĵoj en ĝi spertigis al vizitantoj utilecon de lignaj konstruaĵoj.

Vankuvero estas tipa urbo kun elmigrintoj el diversaj lokoj de la mondo. Kompreneble tie restas ankaŭ indiĝenaj indianoj. Kvankam oni povas vidi indianojn nur en fotoj en la pavilono, tamen Dan Qing kaj la artistoj ĝoje interparolis kun laborantoj en la pavilono.

"La temo 'Bela Urbo, Bela Vivo' estas tre bona. Tamen ĝi ne signifas, ke oni povas forĵeti objektojn ekster la moderna civilizacio," diris Dan Qing. "Ni deziras disvolviĝon, sed ne devas forgesi herediĝon. Estas ĝojinde, ke la moderna civilizacio estas pli kaj pli proksima al ni, sed estas malĝojinde, ke la tradiciaj kulturoj estas iom post iom malproksimaj de ni. Urbo bezonas apogon de sciencoj kaj teknikoj, kaj ankaŭ nutradon de kulturoj."

Fantazia vojaĝo de knabo el Taibei



Zhang Genglun en la Komuna Pavilono de Ŝanhajaj Entreprenoj

de LI ZIHENG



Kontraŭvola forlaso de la pavilono

Taibei de Ĉinio lernas en la tria klaso de elementa lernejo. Pro tio, ke lia patro eklaboris antaŭ nelonge en ŝanhaja entrepreno, lia patrino kaj li transloĝiĝis al la urbo Ŝanhajo. Por koni Ŝanhajon, kie laboras la patro, historion kaj estontan disvolvion de la urbo, kie ili vivas, la patrino kondukis lin speciale al ŜME kaj unue vizitis la Komunan Pavilonon de Ŝanhajaj Entreprenoj sidantan en la Puxi-a Zono de la ĝardeno de ŜME.

La Komuna Pavilono de Ŝanhajaj Entreprenoj kun la ideologio pri ekologio, mediprotektado kaj kreiveco areoj 4 mil kvadratajn metrojn. Tio estas ekologi-mediprotekta konstruaĵo kun saĝeco de ŝanhajaj entreprenoj, urba modo, inteligenta teknologio kaj interreaga spertado. Tie la vizitantoj povas sperti inteligentajn robotojn, reutiligon de regeneritaj materialoj, kuirejon administradatan de roboto, lum-ondan hejmon de estonta familio ktp. La pavilono montras, ke ŝanhajaj entreprenoj aktive traktas la problemojn pri nunaj klimato kaj medio kaj klopodas por krei pli harmonian loĝmedion kun altigo de la ekonomia disvolviĝo kaj konstruado de la bela vivo en urboj. El la ekspozitaĵoj en la pavilono estas multaj kreivaĵoj de ordinara ŝanhajanoj. Tiuj nov-teknologiaj kaj nov-

"Jen, Ŝanhajo estas multe simila al Taibei," Zhang Genglun diris kun granda emocio, elirinte el la Komuna Pavilono de Ŝanhajaj Entreprenoj. 9-jara Zhang Genglun el

materialaj fruktoj de aŭdaca kreiveco fantazie montras Ŝanhajon en estonteco sub la intergado de plurmedio kaj partopreno de vizitantoj.

En la pavilono Zhang Genglun pleje ŝatis la sperton de interagado kun multaj vizitantoj en la Rubika Kontrolejo. Kiam la vizitantoj kune aplaudas kaj svingas la manojn, spektante filmon en la pavilono, LED-lumoj ekstere de la pavilono ŝanĝiĝas responde kaj per rekta signalo spertigas al la vizitantoj la ĉarmon de la rubika pavilono. Zhang Genglun diris, ke tiun momenton li sin trovis mirinda kvazaŭ Harry James Potter.

La patro diris al li, ke ŝanhajaj pladoj estas ege bongustaj. En la kuirejo administradita de roboto en la tria etaĝo de la pavilono, lia patrino Zhou Xiurou mendis la pladon "kristalaj senŝeligigitaj salikokoj" kontraŭ 50 juanoj, la roboto Aike laŭ la proceduro farita de majstra kuiristo: meti oleon, kirladi, aldoni spicaĵojn, kuiri..., kaj en ĉ. 8 minutoj la bongusta plado estis preparita.

La vizito de Zhang Genglun al la Komuna Pavilono de Ŝanhajaj Entreprenoj estis finita, sed li ankoraŭ ne volis forlasi la pavilonon, kaj la bela vivo montrita de la pavilono multe inspiris al li. Lia patrino kaj li ambaŭ esprimis, ke ili jam enamiĝis al Ŝanhajo, urbo plena de vivipovo kaj modo, kaj havas plenan fidon al la nova vivo.



Zhang Genglun en filmado

CANADA
加拿大



Ekologia domo de Ŝanhajo — estonteca verda vivo



de YAN YAN



Gao Hehe (dekstre) en vizitado

Enirinte la plej bonan praktikan distrikton de la ĝardeno de Ŝanhaja Monda Ekspozicio (ŜME), oni povas vidi kvar-etaĝan domon kun blua, blanka kaj griza "vesto", tiu estas la "ekologia domo de Ŝanhajo", la unusola objekto de Ŝanhajo en ŜME.

Ĉirkaŭ la delikata kaj bela domo estas strateto, ekstera muro, tegmenta fenestro, natura lumo kaj aliaj elementoj elmontrantaj tradician ŝanhajan karakterizaĵon. Pasante en la domo, oni ŝajne iras en ekologia ĝardeno.

"Kiel feliĉe estus, se mi vivus en tia domo!" tion diris 22-jara fraŭlino Gao Hehe dum sia vizitado al la ekologia domo de Ŝanhajo en la 14-a de julio, ĉar ŝi opinias ke la domo kun multaj



En la ekologia domo



En la ekologia domo

En la infana ĉambro estas renovigebla muro por manskribado, en la necesejo estas fekujo aŭtomate reguligebla en alteco, en la manĝejo roboto servas kiel kuiristo kaj kelnero, estas en la domo ankaŭ roboto-flegisto por maljunulo, kiu povas ekzameni la arterian tension, telefoni al doktoro por ricevi telemedicinon, tie eĉ ekzistas nova fridujo ligita al interreto, kiu povas ne nur atentigi mastron aĉeti bezonaĵon, sed ankaŭ aŭtomate komuniki memservan vendejon, por ke ĝi sendu la bezonaĵon.

Gao Hehe plej miras, ke la domo estas "sen konsumo de energio", ĉar tiu domo multe uzas verdajn, mediprotektajn kaj energio-ŝparajn ekologiajn teknikojn. La fenestroj, muroj, tegmento kaj ekranego de la domo estas aspekte ordinaraj, efektive, ĉiuj ili estas "ekspertoj" en produktado de energio: la energio produktata de akvopelado en

teknikoj alportis al ŝi tutnovan sperton.

La altteknika vivo montrata en tiu domo altiras multajn personojn: en



Ekranego farita el algoj



Gao Hehe (maldekstre de la unua vico) en "ekologia domo de Ŝanhajo"

necesejo povas esti rezervita por produkti elektron, la fuela pilo en la kuirejo povas turni naturan gason al elektro, kaj la perdita energio povas turniĝi al varma energio, tio povas kontentigi bezonadon de tri personoj en elektro kaj varma akvo. Krome, la bela ekranego farita el algoj en la ĉambro povas ne nur ornami ĉambrojn, sed ankaŭ purigi aeron pro sorbado de karbona dioksido en ĉambro. La balustroj de la balkono sorbas sun-energion tage kaj fariĝas belaj lampoj nokte.



Cirkula uzado de akvo en la domo



"Antaŭe mi povis tion legi nur en sciencfikcia libro, sed nun mi vidas ĉion propraokule, kaj nun mi Robotoj ludantaj muzikon tre atendas estontecan familian vivon." Gao Hehe opinias, ke la ekologia domo de Ŝanhajo elmontras ideon kiel uzi scienc-teknikon por ĝui belan vivon de malmulta konsumado de energio.

"Scienco kaj tekniko plibonigas vivon, kaj pri tio mi tre konsentas. Kvankam tia domo ankoraŭ ne povas populariĝi en nia vivo, sed ĝi vidigas al ni la videblan verdan estontecon." Gao Hehe esperas ke la ekologia domo de Ŝanhajo fariĝos de "koncepta domo" en efektivan loĝdomon kiel eble plej baldaŭ.



Gao Hehe (dekstre) en la akvoŝpara ekspon-halo



Vizitantoj en "ekologia domo de Ŝanhajo"



Ideo pri malalta karbono en pavilonoj de ŜME

Oni diris, ke ŜME bone realigis la ideon pri malalta karbono.

La pavilonoj de ŜME kun zorgoj de projektintoj pri konstruo-materialoj kaj ĝiaj funkcioj enkorpegis la ideon pri "malalta karbono". Oni aplikis la avangardajn teknikojn en konstruado, kaj fandis en la konstruaĵoj, precipe en la muroj, siajn komprenon de mediprotekto kaj penadon en tiu flanko. Tiuj zorge faritaj konstruaĵoj kaj precipe iliaj muroj bone kontentigis la estetikan bezonon de la vizitantoj.



Eksteraj muroj el korko vaste uzata por la Portugala Pavilono



Eksteraj muroj de la Brazila Pavilono dekoraciitaj per ligno reutiligeblaj



Muroj de la Finna Pavilono estas el kunmetitaj konstruaj materialoj nov-tipaj. Ili, malmolaj, frotorezistaj, malpezaj kaj senkoloriĝaj, estas facile malmunteblaj kaj reutiligeblaj



La eksteraj muroj de la Danlanda Pavilono estas plenaj de truoj, kiuj faciligas ventumadon kaj kondukas la sunlumon en la pavilonon, kaj nokte la lampolumoj trairas tiujn truojn por prilumado



Sur la ekstera muro de la Brita Pavilono "vidiĝas" 60 mil antenoj, kiuj kiel lum-fibro povas konduki sunlumon al sia internaĵo



La ekstera muro de la Svisa Pavilono estas el sojfabo-fibro, kiu povas produkti elektron kaj malkomponiĝi en naturo

Malalt-karbona kuirejo en la Sveda Pavilono



La Sveda Pavilono



de Ji Ming

Koncepta Kuirejo

De post la malfermiĝo de ŜME la "Estonta viv-insulo -- koncepta kuirejo" en la Sveda Pavilono ĉiam altiras al si vizitantojn kaj vekis ilian pripensadon pri la estonta vivo.

Centre de la "Estonta viv-insulo" metiĝas aparatoj ĉiutage uzataj, kiaj akvokrano, kiu povas ŝpari 30% da akvo pere de kelkaj mikro-truoj akvopremo-reduktantaj; la fridujo, kiu povas ŝpari 70% da elektro pro sia frekvenca kompresoro; kaj la bakujo, kiu povas ŝpari 40% da elektro pro sia interno el alojo de aluminio kaj zinko.

Altiris al si rigardojn de vizitantoj ankaŭ la seĝoj kaj tablo inverse pendantaj en la aero kaj diversaj tuboj farbitaj en diversaj koloroj supre ĉirkaŭ la ĉambro. Mikael Ohlsson, la ĝenerala direktoro de IKEA-grupo diris, ke la inversa pendado de tiuj mebloj havas sian aludon, ke oni traktas kaj solvas problemojn per tute inversaj vidpunktoj; kaj tiuj koloraj tuboj simbolas planon pri la konstanta traktado de rubaĵoj "Cirkula Sistema de Urboj" kaj ankaŭ reprezentas reciproke utilajn kaj komune kunstantajn rilatojn inter homoj.

Ohlsson diris: "Por svedoj kuirejo estas centro de la familio, same kiel por ĉinoj." Laŭ li kuirejo ne simple estas loko por manĝi, sed ankaŭ estas ejo por interkomunikado de la familianoj. Samtempe ĝi produktas rubaĵojn, eluzitan akvon, tial ĝi devas porti sur si la taskon purigi la medion, tiasence ĝi estas miniaturo de la socio.

En la "Koncepta Kuirejo" la projektanto montris al vizitantoj la daŭrigeble disvolvan estontecon, kaj nun iuj ideoj pri la kuirejo jam realiĝis.

Ohlsson opiniis: "La hejmo estas la plej grava ejo al homoj." Tio tute konformas al la temo de la ekspozicio -- "Bela Urbo, Bela Vivo". Ĝuste pro tio lia grupo, la plej granda detalisto pri mebloj en la mondo, jam de prepara periodo de la ekspozicio, tutforte sin ĵetis en la konstruadon de la pavilono.

"Estas ĝojinde, ke tiel multaj vizitantoj venis al nia "Koncepta Kuirejo", kaj ni esperas, ke pli da 'verdaj revolucioj' komenciĝos de nia ĉiutaga vivo," diris Ohlsson.



Fronta montrado de malaltkarbona mediprotektado

de YI BIN



Generalo-akademiano Hou Li'an

“La plej grava enhavo de ŜME estas verdeco, mediprotektado kaj fuoelo-ŝparado: Malaltkarbona mediprotektado enkorpiĝas ĉie en la ĝardeno de ŜME, kiaj materialoj uzataj en diversaj pavilonoj, iliaj ekipaĵoj kaj establaĵoj, fokusaj temoj diskutitaj de forumoj,” resumis Hou Li'an, akademiano de la Inĝenieria Akademio de Ĉinio. Hou Li'an longtempe sin okupas pri esplorado



Armitaj policanoj en la ĝardeno de ŜME

pri sinteza medi-reguligado, traktado de akvopoluado, aero-purigado kaj precipe pri reguligado de medio aparte poluita. Li analizis al mi plurajn detalojn, ke ŜME praktikas malaltkarbonan mediprotektadon.

Lumo-katalizado

La vizitantoj de la Aviada Pavilono de ŜME probable ankoraŭ ne atendas ĝian frontan teknologion -- lumokatalizado.

Hou Li'an diris, ke oni lerte uzas la teknologion pri oksido de lumokatalizado en la Aviada Pavilono. Tio helpas al aero-purigado kaj purigado de la surfaco de la pavilono.



Nul-ellasaj aŭtoj en la ĝardeno de ŜME

Akademiano Hou diris, ke la rezulto de la plej freŝa enketado pri la aera kvalito de la loĝa medio montras, ke la aera kvalito de la loĝa medio ne estas ĝojiga. Nemediprotektaj materialoj por konstruado kaj dekorado ellasis tro da poluaĵoj en la aeron, kaj la homoj eniras en la periodon de nova aero-poluado de la loĝa medio. Lumokatalizado, nova teknologio por aero-purigado, estas pli ideala por trakti aero-poluadon de la loĝa medio internacie.

En 2001 tiu ĉi teknologio estis uzata por la unua fojo en usona spacostacio. Akademiano Hou konigis al mi, ke tiu ĉi teknologio taŭgas ankaŭ por trakti toksan organikan substancon malfacile biodegradeblan kaj povas rapide malkomponi plurajn organikajn poluaĵojn, kiaj alkoholo, aldehido, ketono kaj aromatikoj.

Daŭrigebla akvofonto laŭ maŝinoj por rekte trinkebla akvo

Nemalmultaj vizitantoj trinkis akvon el maŝinoj en la ĝardeno de ŜME, sed ne sciis, ke tio estas ekzempla konstruo por praktiki daŭrigeblan akvofonto-disvolvadon. Akademiano Hou opinias, ke lernindas teknologioj pri akvo-purigado kaj traktado de eluzita akvo en la ĝardeno de ŜME.

Hou Li'an diris, ke la maŝinoj por rekte trinkebla akvo en la ĝardeno de ŜME, elfaritaj de la Instituto pri Medio kaj Inĝenierado sub Tongji-Universitato, povas forigi el akvo substancojn malutilajn al la homa sano kaj rezervas neorganikajn jonojn utilajn al la homo, kiaj kalcio kaj

magnezio. Dank' al sia avangarda akvokvalito-monitoro, la maŝino garantias la sekurecon de la trinka akvo kaj samtempe reduktis plasto-rubon kaj duafojan poluadon kaŭzitan de plasto-produktado kaj de akvo-transsendo tra tubo.

Esploro pri aplikado de sciencaj kaj teknologiaj atingoj post ŜME

Oni devas aktive fari esploron pri aplikado de sciencaj kaj teknologiaj atingoj post ŜME pere de kombina rimedo de sendependa kreiveco kaj enkondukitaj avangardaj teknologioj, ekspluati energion de vento, suno kaj aliaj reproduktitaj fuoj malaltkarbonaj, nul-ellasaj kaj puraj, firme teni regularon de mediprotektado, racie uzi resursojn, reutiligi eluzitajn materialojn, ŝpari fuojn kaj redukti ellasadon cele realigi profito-plejgrandigon. Lerni novajn teknologiojn pri fuoelo-ŝparado kaj pri mediprotektado, uzi rilatajn novajn materialojn en urbo-konstruado donos profundan influon al daŭrigebla disvolviĝo de ĉinaj urboj.

ŜME, precipe ĝiaj volontuloj, lasis belan impreson al akademiano Hou. “Per siaj diligenteco, afableco kaj zorgemo, ili garantias bonordon kaj purecon de la pavilonoj kaj ĝardeno de ŜME, kaj ricevis vastan aplaŭdadon de la vizitantoj ĉinaj kaj alilandaj.

Armitaj policanoj respondecantaj pri la sekureco de ŜME faris kontribuon por ŜME, sed ankoraŭ ne povis ĝui ĝian ĉarmon. Kiel militisto, akademiano Hou diris: “Mi devas lerni de ili kaj saluti ilin kun respekto!”



La Aviada Pavilono de ŜME (foto de Feng Jin)



Kranoj por rekte trinkebla akvo en la ĝardeno de ŜME





Ceremonio por estingi lumilojn en la Taiwan-a Pavilono

La 31-a de oktobro estas la dato de fermo de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio (ŜME). Tamen neniel malkreskis la entuziasmo de homoj por viziti ŜME.

Vizitantoj: kune pasigi belan momenton

Je la 8-a horo de la 31-a de oktobro, pli-ol-70-jaraj geedzoj Gong Linsheng kaj Zhu Huijuan venis al la enirejo de la ĝardeno de ŜME por ĝin viziti.

Tio estas ilia kvina vizito al la ĝardeno. Tamen por ili la ĉi-foja havas malsaman signifon: Kiel ili diris: "Hodiaŭ fermiĝos ŜME, ni ne volas preterpasi la belan momenton kaj aĉetis biletojn por viziti. Estiel ĉinoj, ni tre fieras pro gastigo de la Monda Ekspozicio en Ŝanhajo."

Ili diris al mi, ke ili jam vizitis 40 pavilonojn, inter kiuj la Ĉina Pavilono plej plaĉas al ili.

Tiutage ili vizitis la Komunan Pavilonon de Provincoj, Regionoj kaj Municipoj de Ĉinio kaj la Komunan Pavilonon de Afriko, kaj "surmetis 40-an stampon".

Krom la geedzoj ankaŭ multaj aliaj vizitantoj venis al la ĝardeno por ĝui la lastan momenton de ŜME.

34-jara projektisto Zhou Kexin veturis de Hangzhou al la ĝardeno de ŜME. Li aĉetis en la pavilono "Ni estas en la Mondo" tri malaltkarbonajn transportajn kartojn. Estas neatendite, ke li fariĝis la dek-mil-a partoprenanto de karboneŭtrigo, kaj pro tio la pavilono donis al li koncernen ateston kaj donacon, kiuj fariĝos eternaj memoraĵoj por li pri ŜME.

Geedzoj Lu Weihong el Dongyang de Zhejiang-provinco vizitis la ĝardenon de ŜME du fojojn. Hodiaŭ ili kaj ilia 7-jara nepino venis por fari lastan viziton antaŭ fermo de ŜME. Kvankam sur la Azia Placo jam kolektiĝis amaso da homoj spektantaj prezenton, tamen ili ankoraŭ haltis kaj rigardis tirlongigante sian kolon. La avo eĉ metis sian nepinon sur

Neforgesebla Ŝanhaja Monda Ekspozicio

de YI REN

sian ŝultron por ke ŝi bone vidu.

Amikiĝi en pavilonoj

Jam estis la 22-a horo kaj fermiĝis ĉiuj pavilonoj en la ĝardeno de ŜME. Tamen oni ankoraŭ povis aŭdi kantojn el la Singapura Pavilono, kiuj akompanis la vizitantojn elirantajn el la pavilono. De la 30-a de oktobro superklasaj muzikistoj kaj famaj orkestroj faris prezentadon en la pavilono. Krome oni okazigis tie montradon de pentraĵoj el maltozo, papereklondaĵoj kaj gravuro de sigeliloj. Ĉe la enirejo de la pavilono staras ora dezirarbo, sur kiu oni povas pendi papereton kun sia deziro. Laboranto de la pavilono diris: "Post fermo de ŜME ni portos la paperetojn al Singapuro kiel memoraĵojn."

En la Taiwan-a Pavilono rigardate de vizitantoj estis malŝaltataj la lumiloj, kiuj simbolas monton, riveron kaj spiriton, kaj brilis 184 tagojn.

En la Ĉilia Pavilono ĝoje renkontiĝis laborantoj. Je la 17-a horo la pavilono estis fermita por doni la lastan momenton de ŜME al la multe kontribuantaj laborantoj de la pavilono.

En la pasintaj ses monatoj ĉinaj kaj ĉiliaj laborantoj havigis al si profundan amikecon. Li Bo, ŝanhaja studento servinta en la Ĉilia Pavilono, skribis sur la libro donacata al ĉilia Meguel: "Laborinte 3 monatojn en la Ĉilia Pavilono mi konis vin. Memoru, ke en la fora Ĉinio estas sincera amiko, kiu benas vin." En la fino de sia teksto li skribis en la hispana lingvo "Mi amas vin".

En la Ĉilia Pavilono ĉirkaŭbrakado kaj kisado fariĝis plej populara "lingvo". Multaj ĉinaj studentoj kaj ĉiliaj amikoj reciproke adiaŭis kaj ŝanĝis korespondajn adresojn por teni komunikadon.

En la noktomezo la kanto "Adiaŭo" resonis en la ĝardeno de ŜME.



Ceremonio por transdoni la flagon de la Internacia Ekspozicia Buroo

Ŝanhaja Monda Ekspozicio akceptis 73 milionojn da vizitantoj en 184 tagoj

de XING SHIWEI

La 31-an de oktobro fermiĝis la 184-taga Ŝanhaja Monda Ekspozicio (ŜME). Ĝi montris al la mondo veran Ĉinion, esprimis la deziron de Ĉinio interŝanĝi, kunlabori kaj disvolviĝi kun ĉiuj landoj en la mondo.

Vespere je la 8-a horo kaj 30 minutoj de la 31-a de oktobro ĉina ĉefministro Wen Jiabao deklaris la Ŝanhajan Mondan Ekspozicion 2010 fermita. En la ferma ceremonio faris

artan prezentadon ĉinaj kaj alilandaj artistoj, partoprenantoj, volontuloj kaj vizitantoj de ŜME.

ŜME novigis rekordojn de la Monda Ekspozicio

Laŭ konigo de la Buroo de ŜME, ŜME novigis multajn rekordojn de la Monda Ekspozicio. Ĝi kun partopreno de 189 landoj kaj 57 internaciaj organizoj superis la rekordan Mondan Ekspozicion en Hanovro 2000 kun partopreno



de 177 landoj kaj internaciaj organizoj. Per 73 milionoj da vizitantoj ĝi novigis la rekordon de la Monda Ekspozicio en Osako kun pli ol 64 milionoj da vizitantoj. Per aranĝo de pli ol 20 mil aktivadoj, meznombro 100 aktivadoj ĉiutage, ĝi kreis novan rekordon tiuflanke en la historio de la Monda Ekspozicio.

Krome, ŜME unufoje prenis "urbojn" kiel eksponaĵojn, kaj plej bonaj praktikaj zonoj de urboj kaj reta Monda Ekspozicio fariĝis du kreaĵoj en la historio de la Monda Ekspozicio.

Jean-Pierre Lafon, prezidanto de la Internacia Ekspozicia Buroo, diris en la ferma ceremonio, ke ŜME 2010 estas granda sukceso kaj ĝi brilos por ĉiam. Poste oni transdonis la flagon de la buroo al reprezentanto de la Monda Ekspozicio en Milano 2015.

Ŝanhaja Manifesto proponas difini Urban Tagon de la Mondo



Artaj programeroj en la ferma ceremonio

La 31-an okazis en la ĝardeno de ŜME Pinta Forumo de ŜME. En la forumo oni alvokis resumi la rezultojn de montrado, forumoj



Ferma ceremonio de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio

kaj plej bonaj praktikaj zonoj de ŜME kaj kolekti valorajn spertojn de diversaj landoj en urba disvolvigo kaj komunan saĝon de la homaro en esplorado de urba disvolvigo por disvastigi ilin en la mondo.

La forumo publikigis *Ŝanhajan Manifeston*, kiu proponas difini la 31-an de oktobro Urba Tago de la Mondo.



Ŝanhaja Monda Ekspozicio akceptis 73 milionojn da vizitantoj en 184 tagoj



Tomiyo Yamada kaj ŝiaj tagoj en ŜME

La 31-an de oktobro Tomiyo Yamada antaŭ la Ĉina Pavilono



Tomiyo Yamada montras sian pasporton de ŜME

Frumatene de la 31-a de oktobro kiel en la pasintaj tagoj Tomiyo Yamada kun siaj edzo kaj filo eniris en la ĝardenon de ŜME tra la 5-a pordo proksima al la Ĉina Pavilono. Tiu tago por ŝi estas iom distinga, ĉar ŝi realigos sian sonĝon, ke en 184 tagoj de ŜME ĉiutage ŝi akompanita de la familianoj vizitis la ĝardenon, kaj tio neniam interrompiĝis. Tial ŝi gajnis honoran atestaĵon donitan kune de Kunordiga Buroo de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio kaj "Matena Poŝto de Ŝanhajo". Laŭstatistike de ŝi kaj la familianoj en la pasintaj 183 tagoj ŝi restis en la ĝardeno totale 45463 minutojn, aparte en la 7-a de majo ŝi 723 minutojn restis tie plej longe kaj en la 14-a de julio 23 minutojn -- plej mallonge.

Tomiyo Yamada diris: "La Monda Ekspozicio estas kiel

lernejo, en kiu mi povas lerni multe. En ŜME mi konatiĝis kun multaj amikoj parolantaj diversajn lingvojn kaj tie mi ricevis varman akcepton, eĉ iam mi sentis, ke mi fariĝus ŝanhajano."



Tomiyo Yamada en la Tibeta Pavilono

Tabelo de la Mondaj Ekspozicioj

| Tempo | Gastiganto | Titolo | Temo |
|-------|------------------------|---|--|
| 1851 | Londono, Britio | Granda Industria Ekspozicio | |
| 1855 | Parizo, Francio | Pariza Monda Ekspozicio | |
| 1862 | Londono, Britio | Londona Monda Ekspozicio | |
| 1867 | Parizo, Francio | 2-a Pariza Monda Ekspozicio | |
| 1873 | Vieno, Aŭstrio | Viena Monda Ekspozicio | |
| 1876 | Filadelfio, Usono | Filadelfia Monda Ekspozicio Okaze de Usona Centjariĝo | |
| 1878 | Parizo, Francio | 3-a Pariza Monda Ekspozicio | |
| 1883 | Amsterdamo, Nederlando | Amsterdama Monda Ekspozicio | |
| 1889 | Parizo, Francio | Monda Ekspozicio 1889 | |
| 1893 | Ĉikago, Usono | Ĉikaga Monda Ekspozicio Memore al Kolumbio | |
| 1900 | Parizo, Francio | 5-a Pariza Monda Ekspozicio | |
| 1904 | Sankta Luizo, Usono | Monda Ekspozicio Memore al Centjariĝo de Sankta Luizo | |
| 1908 | Londono, Britio | Londona Monda Ekspozicio | |
| 1915 | San-Francisko, Usono | Panama-Pacifika Monda Ekspozicio en San-Francisko | |
| 1925 | Parizo, Francio | Pariza Monda Ekspozicio pri Dekoracio kaj Arto | |
| 1926 | Filadelfio, Usono | Monda Ekspozicio Memore al 150-jariĝo de Filadelfio | |
| 1930 | Lieĝo, Belgio | Lieĝa Monda Ekspozicio pri Industria Sciencoj | |
| 1933 | Ĉikago, Usono | Ĉikaga Monda Ekspozicio | Centjara Progreso |
| 1935 | Bruselo, Belgio | Brusela Monda Ekspozicio | Paco Pere de Konkurencio |
| 1937 | Parizo, Francio | Pariza Monda Ekspozicio pri Artoj | Arto kaj Tekniko en Moderna Vivo |
| 1939 | Nov-Jorko, Usono | Nov-Jorka Monda Ekspozicio | Konstruado de Morgaŭa Mondo |
| 1958 | Bruselo, Belgio | Brusela Monda Ekspozicio | Scienc-gvida Civilizacio kaj Humanismo |

| Tempo | Gastiganto | Titolo | Temo |
|-------|---------------------|---|---|
| 1962 | Seattle, Usono | 21-a-jarcenta Monda Ekspozicio en Seattle | Homaro en la Spaca Epoko |
| 1964 | Nov-Jorko, Usono | Nov-Jorka Monda Ekspozicio | Paco tra Kompreniĝo |
| 1967 | Montrealo, Kanado | Kanada Monda Ekspozicio | La Homaro kaj la Mondo |
| 1970 | Osaka, Japanio | Osaka Monda Ekspozicio | Progreso kaj Harmonio por Homaro |
| 1974 | Spokane, Usono | Monda Ekspozicio 1974 | Progreso de Senpoluado |
| 1975 | Okinava, Japanio | Okinava Monda Ekspozicio pri Oceanoj | La Maro Dezirata |
| 1982 | Knoxville, Usono | Knoxville-a Monda Ekspozicio pri Fuelo | Fueloj Turnas la Mondon |
| 1984 | Nov-Orleano, Usono | Nov-Orleana Monda Ekspozicio pri Riveroj | Mondo de Riveroj - Fonto de Vivo |
| 1985 | Tsukuba, Japanio | Tsukuba Monda Ekspozicio | Loĝejoj kaj Medio -- Scienco kaj Teknologio por Homa Loĝado |
| 1986 | Vankuvero, Kanado | Vankuvera Monda Ekspozicio pri Komunikado | Mondo en Moviĝo, Mondo en Kontaktiĝo |
| 1988 | Brisbano, Aŭstralio | Brisbana Monda Ekspozicio | Libera Tempo en la Epoko de Teknologioj |
| 1990 | Osaka, Japanio | Osaka Monda Ekspozicio pri Floroj | Interrilatoj de Ĝardenoj kaj Verdejoj por la 21-a Jc. |
| 1992 | Ĝenova, Italio | Ĝenova Monda Ekspozicio | La Ŝipoj kaj la Maro |
| 1992 | Sevilla, Hispanio | Sevilla Monda Ekspozicio | La Erao de Malkovrado |
| 1993 | Daejeon, Koreio | Daejeon-a Monda Ekspozicio | La Defio de Nova Vojo al Disvolvo |
| 1998 | Lisbono, Portugalio | Lisbona Monda Ekspozicio | Oceanoj - Riĉaĵo por la Venonto |
| 2000 | Hanovro, Germanio | Hanovra Monda Ekspozicio | Homaro, Naturo, Teknologio - Nova Monda Leviĝo |
| 2005 | Aichi, Japanio | Aichi-a Monda Ekspozicio | Saĝo de la Naturo |
| 2008 | Zaragoza, Hispanio | Zaragoza Monda Ekspozicio | Akvo kaj Daŭrigebla Disvolvo |
| 2010 | Ŝanhajo, Ĉinio | Ŝanhaja Monda Ekspozicio | Bela Urbo, Bela Vivo |
| 2012 | Yeosu, Koreio | Yeosu-a Monda Ekspozicio | Vivoplenaj Oceanoj kaj Plaĝoj: Varieco de Riĉfontoj kaj Daŭrigebla Disvolvo |
| 2015 | Milano, Italio | Milana Monda Ekspozicio | Nutron al la Tero, Kuraĝon al la Vivo |

PEKINO

Laŭlum, gajninto de Dumviva Honora Premio pri Tradukado



Prezidanto de la Ĉina Tradukista Asocio Li Zhaoxing (maldekstre) kaj prezidanto de la Ĉina Fremdlingva Eldona Grupo Zhou Mingwei (dekstre) donas la honoran diplomon al Laŭlum

La 2-an de decembro okazis en Pekino disdona ceremonio de la Dumviva Honora Premio pri Tradukado de la Ĉina Tradukista Asocio (ĈTA). Ĝi estas la plej alta premio en la ĉina traduka rondo. Kvin famaj ĉinaj tradukistoj inkluzive de Esperanto-tradukisto Laŭlum ricevis la premion. Ĉeestis al kaj faris paroladon en la ceremonio Li Zhaoxing, prezidanto de ĈTA kaj eksa eksterfera ministro de Ĉinio, kaj Zhou Mingwei, prezidanto de la Ĉina Fremdlingva Eldona Grupo.

87-jara Laŭlum estas eksvicĉefredaktoro de El Popola Ĉinio kaj akademiano de UEA. En lastaj jaroj li esperantigis multajn famajn ĉinajn klasikajn romanojn kaj novelojn kiaj *Ĉe Akvorando*, *Pilgrimo al la Okcidento*, *Romanoj pri la Tri Regnoj*, *Mirrakontoj de Liaozhai* k.s. Liaj kelkaj tradukaĵoj enlistigis en la Serion Oriento-Okcidento de UEA. Dank' al lia kontribuo al la Esperanta literaturo UEA donis al li premion Grabowski en 2003.

En la ceremonio ricevis la premion ankaŭ ĉinŝtataneca uson-devena tradukisto Sidney Shapiro, angl- kaj franc-lingva poem-tradukisto Xu Yuanchong, rus-lingva tradukisto Cao Ying kaj angl-lingva tradukisto Tu An.

Sidney Shapiro naskiĝis en 1915 en Usono, li lernis la ĉinan lingvon post sia ekssoldatiĝo kaj post



9-monata lernado de la ĉina lingvo li venis al Ĉinio, kie li edziĝis al ĉinino Fengzi kaj pro tio li ekloĝis en Ĉinio kaj akiris la ĉinan ŝtatanecon. En sia 58-jara traduka kariero li el la ĉina lingvo angligis *Ĉe Akvorando*, *Familion*, *Deng Xiaoping* k.s., kaj per tio li faris grandan kontribuon al la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Pro sia granda aĝeco Shapiro ne povas persone partopreni la ceremonion, kaj anstataŭ li lia kolego prenis la honoran diplomon.

89-jara Xu Yuanchong estas fama en Ĉinio pro sia poem-tradukado en la angla kaj franca lingvoj, li tradukis *Libron de Poezio*, *Poeziaĵojn de Chu* k.s.

La aliaj du tradukistoj Cao Ying kaj Tu An estas 87-jaraj, ili ricevis la honoron ankaŭ pro sia granda kontribuo kaj diligenta laboro en tradukado. Cao Ying el la rusa lingvo ĉinigis la *Kompletan Verkaron de Leo Tolstoj*, *Maljunulo de Platonov*, kaj multajn aliajn famajn rusajn literaturajn verkojn. Tu An ĉinigis *Soneton de Shakespeare*, kies totala eldon-kvanto ĝis hodiaŭ atingis 600 mil ekzemplerojn, kaj estas bonvena lia traduko de poemaro *Tamburbruo* (Drum-Taps) verkita de usona poeto Walt Whitman.

Krom ĉi-jaraj 5 premiitoj, fakte en 2006 kaj 2009 ankaŭ Ji Xianlin kaj Yang Xianyi gajnis la saman premion. Kaj aliaj 492 ĉinaj tradukistoj ricevis honoran titolon "Veterana Tradukisto".

(Chen Ji)

PEA aranĝis prelegojn

La 12-an de junio la Pekina Esperanto-Asocio (PEA) aranĝis prelegon en Libro-vendejo Haidian, Pekino, en kiu Yu Jianchao, raportistino de Esperanta Sekcio de la Ĉina Radio Internacia, faris prelegon pri furoriĝo de la ĉina lingvo en la lastaj jaroj en la mondo. Ŝia prelego komenciĝis de la ĉina kulturo en la Olimpikaj Ludoj en Pekino en 2008 kaj en la Ŝanhaja Monda Ekspozicio en Ŝanhajo, analizis la fandiĝon de la ĉina kulturo en la grandaj internaciaj eventoj, kaj el tio venis la konkludo, ke la furoriĝo de la ĉina lingvo dependas de la leviĝo de internacia pozicio de Ĉinio en la mondo.



Ĉi-jare la Pekina Esperanto-Asocio sinsekve aranĝis 7 prelegojn en Pekino. Tiuj prelegoj temas pri lingvistiko, Esperanto, la ĉina kulturo, sociologio kaj aliaj flankoj. La prelegoj altiris al si totale 300 aŭskultantojn kaj vekis de ili grandajn interesojn pri lingvistiko kaj pri Esperanto.

(Xiao Huoli)

Forpasis Chai Zemin

Frumatene de la 7-a de junio 2010 je la 1-a horo kaj 58 minutoj forpasis Chai Zemin, prezidanto de la ĉina societo Amikoj de Esperanto, en la aĝo de 93 jaroj. Chai Zemin estis fama ĉina diplomato. Li servis sinsekve kiel ambasadoro de Ĉinio en Hungario, Gvineo, Egiptio, Tajlando kaj Usono kaj eksprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj. Kaj kiel la unua ambasadoro de la Ĉina Popola Respubliko en Tajlando kaj Usono, li multe kontribuis por la ĉinaj eksteraj aferoj.



Chai Zemin (1917-2010)

Li eklernis Esperanton en 1930-aj jaroj, siatempe li verkis per Esperanto en gazetoj por disvastigi la lingvon Esperanto. En 1986 li elektiĝis kiel prezidanto de la societo Amikoj de Esperanto kaj en sia posteno li energie antaŭenpuŝis Esperanto-movadon de Ĉinio kaj multe kontribuis por la laboro de la Ĉina Esperanto-Ligo. Li partoprenis en la 89-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino.

La funebra ceremonio por s-ro Chai okazis la 13-an de junio 2010 en Pekino.

(Chen Ji)

Unua ĉina gajninto de atesto pri parkera kantado de "La Espero"



Dum la okazo de la 6-a Esperanto-kongreso de Nordoriento kaj Interna Mongolio de Ĉinio, ni renkontis eksprezidanton de KAEM kaj eks-estraron de UEA HORI Yasuo el Japanio, kiu antaŭ nelonge lanĉis movadon "parkere kanti la himnon 'La Espero'". Por respondi lian alvokon, redaktoro de El Popola Ĉinio Jin Chenxi aliĝis al la ekzameno de la kantado, kaj fine gajnis la ateston, fariĝis la unua ĉina gajninto de la atesto de la parkera kantado de la himno "La Espero".

Kiam HORI Yasuo, iniciatinto de tiu movado, donis ateston al Jin Chenxi, li diris, ke e-istoj serioze uzu la lingvon, ne nur rigardu ĝin kiel amatoran aferon. Li diris ankaŭ, ke kiam oni serioze lernas la lingvon, oni devas serioze praktiki ĝin, nur tiamaniere la Esperanto-movado povas disvolviĝi rapide. Laŭ li parkera kantado de la himno "La Espero" estas devo de ĉiuj e-istoj kaj nur post kiam iu esperantisto povas kanti la himnon parkere, li kapablas disvastigi nian lingvon kun forta memfido.

(Chen Ji)

ŜANHAJO

Faka konsultado de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio

La 12-an de novembro 2010 la Ŝanhaja Esperanto-Asocio okazigis en la Ŝanhaja Politeknika Universitato la fakan konsultadon



"Lerno kaj studo de Esperanto" kiel unu el la aktivadoj de la 9-a Sociscienca Semajno de Ŝanhajo komencita en la 10-a de novembro de 2010.

La agado allogis multajn studentojn, kiuj kun granda intereso konsultis pri la lingvo Esperanto kaj rilataj aferoj, kiaj uzado de Esperanto kaj kampoj kie aplikiĝas la lingvo.

S-ro Wang Minhao, prezidanto de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, kaj s-ro Zhou Tianhao, ĝenerala sekretario de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, ĉeestis la agadon, donis respondojn al la studentoj respektive, kaj disdoniĝis surloke ĉ. 500 materialoj, presitaj de la asocio, por diskonigi Esperanton.

(Wang Minhao)

Jarkunveno 2010 de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio



En la 31-a de oktobro okazis la jarkunveno 2010 de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Tio estis unu el la programoj de la 4-a Scienca Monato de la Ŝanhaja Sociscienca Asocio en 2010.

La jarkunvenon ĉeestis pli ol 40 personoj, inkl. de belga samideano Gregoire Maertens, eksa prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio de 1980 ĝis 1986, kiu faris viziton al ŜME, kaj irana samideano Saed Abbasi, kiu laboras en Ŝanhajo. Ili laŭinvite faris paroladon en la jarkunveno de la asocio.

En la sama tago fermiĝis ŜME. S-ro Wang Minhao, prezidanto de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, faris prelegon pri la temo "ŜME kaj Esperanto". Li retrorigardis per diapozitivo la 184-tagan ŜME sukcesan, brilan kaj neforgeseblan kun la temo "Bela Vivo, Bela Urbo", kaj emfazis la ideologion de la Monda Ekspozicio "Kompreno, interkomunikiĝo, kuniĝo kaj kunlaboro".

Ŝanhajaj esperantistoj ĝojas, ke ŜME allogis al la urbo Ŝanhajo ankaŭ nemalmultajn esperantistojn el diversaj landoj, lokaj esperantistoj faris kun ili vastan interŝanĝon. Laŭ nekompleta kalkulo, ŜME vizitis samideanojn el Usono, Brazilo, Japanio, Italio, Francio, Svislando, Grekio, Armenio, Pollando, Belgio, Rusio, Hispanio, ktp. La Ŝanhaja Esperanto-Asocio fervore akceptis diverslandajn

samideanojn, kunsidis kun ili, aŭskultis ilian raporton kaj faris kun ili interŝanĝon pri Esperanto. UEA-eksprezidanto



Gregoire Maertens retrorigardis en sia parolado la 71-an Universalan Kongreson de Esperanto okazintan en Pekino en 1986, tiam li servis kiel prezidanto de kelkaj kunvenoj. Li informis al la kunveno la situacion de la Esperanto-movado en Eŭropo kaj laboron de la Universala Esperanto-Asocio. Li montris, ke nun oni estas en la periodo de tutmondiĝo kaj esperantistoj havas ankoraŭ pezan taskon por plenumi. La Universala Esperanto-Asocio devas pliintensi la kontaktiĝon ne nur kun landaj kaj regionaj organizoj de Esperanto, sed ankaŭ kun esperantisto-individuoj por antaŭenpuŝi disvastigon kaj praktikadon de Esperanto en nova situacio.

Irana samideano Saed Abbasi prezentis la situacion de sialanda Esperanto-movado, kaj samtempe sin mem. Dank' al Esperanto, li konatiĝis kun multaj ĉinaj amikoj en diversaj lokoj de Ĉinio dum pli ol tri jaroj, faris vastan interflon kun ili kaj ĝuis multajn helpojn liveritajn de ĉinaj amikoj. Esperanto pliprofundigis nian interkomprenon kaj pliintimigis nian amikecon.

(Wang Minhao)

Esperanto-salono en Ŝanhajo



La 30-an de majo 2010 Ŝanhaja Esperanto-Asocio (ŜEA) okazigis Esperanto-salomon, kiun prezidis

Chai Benrong, vicprezidanto de ŜEA, s-ro Ji Yingen lernigas al la partoprenantoj gramatikon de la lingvo kaj s-ro Cun Zhiqin kune kun la ĉeestantoj ĝuis sian esploradon kaj studadon en san-protekta efiko de teoj. S-ro Wang Minhao, prezidanto de ŜEA, alvokas la ĉeestantojn, ke ili kiel gastigantoj de ĉi-jara monda ekspozicio, dum

vizito al la ĝardeno de ŜME devas observi ĝian regularon kaj ordon.

La E-salono de ŜEA komenciĝis de 2006 post okazo de la 58-a Internacia Fervoja E-Kongreso en Ŝanhajo kaj okazas ĉiumonate por helpi al la asocioj levi lingvonivelon kaj por interŝanĝi informojn en esperantujo.

(Chen Ji)

JIANGXI

Tria Lushan-forumo en Nanchang



De la 29-a ĝis la 31-a, inkluzive de la lasta semajnfino de oktobro, okazis en Nanchang,

ĉefurbo de Jiangxi, sudorienta Ĉinio la Tria Lushan-Forumo de Esperanto, kiun partoprenis 47 esperantistoj el Pekino kaj provincoj Jiangsu, Hubei, Guangdong k.a. La forumo kun temo "Komunikado trans landoj" estas gastigita kune de Esperanto-Asocioj de Jiangxi kaj Nanchang.

Cao Xionglin, prezidanto de Nanchang-a E-Asocio, prezidis la inaŭguron, en kiu faris la laborraporton de Jiangxia-a E-Asocio Gong Xiaofeng, prezidantino de Jiangxi-a E-Asocio. En la pasintaj tri jaroj Jiangxi-a kaj Nanchang-a E-Asocioj dufoje organizis Lushan-forumon de Esperanto, funkciigis E-kursojn en Nanchang-a Universitato kaj okazigis E-aktivadojn por disvastigi Esperanton al la publiko. Gong Xiaofeng, profesorino de Nanchang-a Universitato en tre malbona sanstato konstante gvidis E-kursojn per konversaciaj softvaroj QQ kaj YY kaj elkulturis multajn e-istojn. Ŝiaj laboroj vekis varmajn aplaŭdojn de la ĉeestantoj. Ŝi en sia prelego konigis al la ĉeestantoj sian komprenon pri la lingvo Esperanto, kaj prezentis al ili utilajn retadresojn pri Esperanto por helpi ilin en lernado de Esperanto per interreto.

En la pasintaj du jaroj Lushan-forumo jam fariĝis tre grava E-renkontiĝo en suda Ĉinio. Ĉi-jare venis el Hubei, je 359 km. for de Jiangxi, dek-kelkaj e-istoj, ili faris brilajn artprezentojn en la interkona vespero kaj faris interesajn prelegojn en la forumo.

Peng Zhengming per interesaj fotoj rakontis sian Esperantan vojaĝon al Eŭropo, kaj Hu Guozhu prelegis pri sia tre ŝatata ĉina antikva poemo. Prelegis ankaŭ Liu Zijia, raportistino de El Popola Ĉinio, pri sia kompreno de la libro *Paroladoj de Zamenhof*.

Ĉeestis en la forumo ankaŭ du fremdlandaj e-istoj laborantaj en Ĉinio -- Aŭgusto, instruisto de hispana lingvo en Kantono, kaj Ivanka, redaktorino de El Popola Ĉinio, el Bulgario. Ilia partopreno aldonis al la forumo internacian etoson. Aŭgusto en sia humura stilo lernigas la kongresanojn pri la hispana lingvo kaj komencantojn pri Esperanto. En ĝoja atmosfero oni lernis lingvojn kaj ĝuis la amikecon de la renkontiĝo. Ivanka konigis al la ĉeestantoj sian landon kaj rakontis sian esperantistiĝon kaj siajn interesajn spertaĵojn pri Esperanto. Ŝi kuraĝigis la ĉeestantojn serĉi siajn Esperantajn korespondajn amikojn por praktiki la lingvon kaj starigi amikecajn rilatojn kun fremdlandaj e-istoj.

Ĉe la fermo de la forumo multaj e-istoj esprimis sian elkoran dankon al la organizantoj por iliaj penadoj en preparo por la valora renkontiĝo por Esperanto.

Profitante de la forumo fondiĝis en la urbo ankaŭ la Jiangxi-a Trejna Centro de Esperanto, per kiu la Jiangxi-a E-Asocio planas konstante kulturi e-istojn. Okazis ankaŭ la prepara kunveno de la Ĉina Ligo de Esperantistaj Instruitoj (ĈLEI), instruista organizo sub la Ĉina Esperanto-Ligo. Se la projekto de fondiĝo de ĈLEI adoptitos de la konstanta komitato de Ĉina Esperanto-Ligo, ĝi fondiĝos komence de 2011 kaj ĝiaj membroj venos el diversaj universitatoj, mez- kaj element-lernenejoj tra Ĉinio. ĈLEI funkcios kaj laboros por reguligi la E-lernadon, altigi lingvo-nivelon de esperantaj instruistoj kaj organizi interŝanĝojn de Esperantolernigo.

(Chen Ji)

INTERNA MONGOLIO

Vizito al Luotuo-a Brand-kompanio

Antaŭtagmeze de la 23-a de oktobro 2010, 18 membroj de la Baotou-a Esperanto-Asocio, invititaj de la Luotuo-a Brand-kompanio de Interna Mongolio, vizitis ĝian produkt-bazon en Jiufengshan-monto, Baotou. Oni vizitis la

distilejojn, brand-konservejojn, grenejon kaj Jiufengshan-vidindaĵon. Estroj de la kompanio opiniis, ke Esperanto havas avantaĝon facile kontaktiĝi kun alilandanoj, esperante, ke la lokaj esperantistoj prezentos la bonkvalitan brandon al aliaj landoj.

Dum la paŭzo la membroj diskutis, kiamaniere la Baotou-a Esperanto-Asocio helpas starigi la E-Asociacion en Baotou-a Ŝtala Kompanio (BŜK). La viziton ĉeestis ankaŭ kelkaj studentoj el la E-kursoj de la Scienc-Teknika Universitato de Interna Mongolio.

(el Baotou-a E-Asocio)

HARBINO

Esperantaj kursoj en Harbino



La 8-an kaj 16-an de novembro 2010 en Harbino, Heilongjiang-provinco de Ĉinio, ekfunkciis du Esperantaj kursoj gvidataj de la Esperanta Instituto Yutong de Harbino. La du kursoj havas 16 kaj 23 lernantojn respektive.

(Esperanto-Asocio de Heilongjiang)

Junulara Seminario de Esperanto en Harbino



En la 15-a kaj 16-a de majo 2010 la 2-a Junulara Seminario en Esperanto okazis en la ĉarma urbo Harbino, nordorienta Ĉinio. La seminario kun temo "Esperanto kaj la ĉina tradicia kulturo" aliris al si ĉirkaŭ 50 ĉeestantojn, inter kiuj plejparte estas gejunoj. Dum la seminario oni alvokis, kiel eble plej multe funkciigi E-kursojn en universitatoj, kiuj havas kondiĉojn, kaj lernigi studentojn per viglaj metodoj por helpi la studentojn pli bone

posedi la lingvon. Kaj en tiu flanko veteranaj e-istoj devas helpi la junulojn.

La seminarion gastigis Heilongjiang-a E-Asocio kaj Esperanto-Instituto Yutong de Harbino. Dum la seminario ili decidis, ke okazos tia seminario ĉiujare en urbo Harbino, tio signifas, ke maje 2011 okazos la 3-a Junulara Seminario.

(Shi Chengtai)

GUANGDONG

88-jariĝo de samideano Yu Jinhui



La 3-an de oktobro 2010 esperantistoj de Kantono kaj Dongguan de Guangdong-provinco en suda Ĉinio kunvenis en la hotelo Shuanglong en la urbo Dongguan por festi la 88-an datrevenon de la naskiĝo de estimata veterana esperantisto Yu Jinhui, unu el la plej aĝaj esperantistoj de la provinco.

Samideano Yu Jinhui per sia refleksebla spirito por nia agado kuraĝigas multajn esperantistojn en nia verdejo. Pro malsano li ne povis partopreni en la 7-a Ĉina Kongreso de Esperanto, pro tio prof. Lin Liyuan larmis ĉagrene.

De longa tempo Yu Jinhui kuraĝigas kaj gvidas junulojn kontribui por nia kara lingvo internacia. Oni povas diri, ke li estas E-kondukanto en la urbo Dongguan.

Yu Jinhui ofte diskonigas Esperanton en diversaj manieroj ekz., mempage presigi Esperantajn vortojn sur kalendaro, mediprotekta sako, pluvombrelo ktp. por ilin disdoni al la amaso...

Por danki kaj prikanti lian kontribuon al nia agado, samideanoj de Kantono kaj Dongguan kolektiĝis kaj komponis versaĵon okaze de lia 88-a jariĝo.

(Petro YE)

Memore al la 123-a datreveno de publikigo de Unua Libro

Memore al la 123-a datreveno de la publikigo de



la *Unua Libro* de Esperanto okazis la 17-an de julio 2010 en la urbo Kantono, Ĉinio, Esperanto-kunveno, en kiu oni faris ankaŭ raporton pri la 6-a Azia Kongreso de Esperanto okazinta en Ulanbatoro, ĉefurbo de Mongolio. La kunvenon ĉeestis pli ol 40 lokaj esperantistoj.

S-ro Petro Ye prezidis la kunvenon, kiu komenciĝis per kantado de la himno "La Espero". S-ro Saŭkio Zhang donis paroladon pri la grava signifo de la *Unua Libro* de Esperanto, s-ro Lin Liyuan faris raporton pri la grandiozeco de la 6-a Azia Kongreso de Esperanto en Mongolio, la Unua Stepa Esperanta Kultura Festo en Baotou kaj la aktivado celebre al la 88-jara naskiĝtago de la estimata veterana esperantisto Li Sen. Poste, Wei Xiaohong kaj Lin Liyuan, prezidanto kaj vicprezidanto de la Kantona Esperanto-Asocio, retrorigardis la laboron de la asocio en la pasintaj du jaroj kaj raportis pri ĝia laboro venontjara.

Post tagmanĝo, iuj samideanoj iris viziti s-ron Dong Shiyang, maljunan soldaton de la ruĝa armeo kaj eksan prezidanton de la Kantona Esperanto-Asocio.

(Wang Lihua)

E-kurso inaŭgurita en la universitato Baiyun



La 7-an de majo 2010 inaŭguriĝis la kurso de Esperanto en la universitato Baiyun en

Kantono, ĉefurbo de Guangdong-provinco.

Dum la malferma ceremonio oni laŭtlegis salutmesaĝojn de landaj kaj internaciaj Esperantaj organizaĵoj, fare de gestudentoj.

La ceremonion ĉeestis, krom la studentaro, lokaj esperantistoj, kaj reprezentantoj de la universitato Baiyun. Mallongajn prelegojn faris s-ro Petro Ye, vicprezidanto de la Esperanto-Asocio de Kantono, s-ro Augusto Casquero, hispana samideano kaj s-ro Dai Shengqiao, profesoro de tiu ĉi universitato, organizanto de la kurso kaj ties instruisto.

La tuta ceremonio estis kortuŝa, kaj la ĉeestantoj kaj gelernantoj montris grandan entuziasmon en lernado de la internacia lingvo Esperanto.

Fine oni kantis la himnon de Esperanto "La Espero".

Tio certe estas kaj estos kuraĝigo por la supre menciita universitato kaj ankaŭ por aliaj universitatoj kaj lernejoj de Ĉinio.

(Augusto Casquero)

JILIN

La Sesa Kongreso de Esperanto en Jilin



La 7-an de aŭgusto, 2010 la Esperanto-Asocio de Jilin-provinco kaj Changchun-urbo kune okazigis la Sesan Kongreson de Esperanto de Jilin, en kiu oni elektis Zhang Jiping kiel honoran prezidanton de la Jilin-a Esperanto-Asocio, Tian Zengyong – prezidanton, Liu Minghui, Xu Jingke, Li Xinmin, Liu Pengzhong, Li Yanqing, Yu Dequan – vicprezidantojn, kaj interalie Liu Minghui kumulas la postenojn de vicprezidanto kaj ĝenerala ekretario. En la kongreso elektiĝis 31 konsilianoj de la asocio.

En la kongreso Zhang Jiping en la nomo de la kvina-sesia konsilio de la asocio faris laborraporton, Tian Zengyong raportis la planon de la nova komitato kaj Liu Minghui prezentis enhavon de la ĵus finita azia kongreso en

Mongolio kaj la esperantan movadon en Ĉinio.
 (Xu Jingke)

LIAONING

Okazis la 6-a EKNIMĈ en Dandong, Ĉinio



Matene de la 21-a de aŭgusto en Liaodong-instituto en Dandong de Liaoning-provinco inaŭguriĝis la 6-a Esperanto-Kongreso de Nordoriento kaj Interna Mongolio de Ĉinio (EKNIMĈ) kun temo "Instruado kaj Aplikado de Esperanto". En la kongreso partoprenis 155 e-istoj el Pekino, Chongqing kaj aliaj 9 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio kaj 4 esperantistoj el Japanio, suda Koreio kaj Usono.

Invitite ĉeestis la kongreson Yu Tao, vicprezidanto kaj ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo, Tan Xiuzhu, prezidanto de kontrolo komisiono de ĈEL, Zhang Wei, estro de Liaoning-universitato, Yang Luping, konstanta asistanta prezidanto de Liaoning-a Federacio de Sociosciencaj Rondoĵoj, Lu Jichen, vicdirektoro de Liaodong-instituto, Zhao Jianping, direktoro de Esperanta sekcio de la Ĉina Radio Internacia, kaj veteranaj e-istoj de Ĉina Esperanto-Ligo, El Popola Ĉinio, Ĉina Radio Internacia kaj aliaj E-organizoj.

Ĉeestis la kongreson ankaŭ nova prezidanto de Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM), japana e-isto Teruhiro SASAKI, eksestrarano de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj eksprezidanto de KAEM sinjoro HORI Yasuo el Japanio, eksvicprezidanto de ILEI Ronald J Glossop el Usono kaj e-istino Ebla el suda Koreio.

Jiao Xiyang, vicprezidantino de Liaoning-a E-Asocio prezidis la inaŭguron, en kiu Yu Tao donis parolon. Li alte taksis la E-movadon de nordorienta Ĉinio kaj kuraĝigis al e-istoj en tiu regiono multe kontribui por disvastigo de Esperanto.

Liu Zhengkun, prezidanto de la kongreso kaj tiu

de Liaoning-a Esperanto-Asocio, faris laborraporton de tiu regiono je la nomo de la E-asocio de Nordoriento kaj Interna Mongolio de Ĉinio. En la pasintaj du jaroj la E-asocioj en tiu regiono, en universitato kaj en socio malfermis E-kursojn kaj lernigis totale pli ol kelkcent E-lernantojn. Por disvastigi E-on ili multfoje organizis E-aktivadojn kaj ricevis bonan efikon.

En la inaŭguro s-ro Teruhiro SASAKI donis sian bonan deziron al la kongreso kaj Hori Yasuo esprimis sian bedaŭron por la invad-milito de Japanio al Ĉinio antaŭ pli ol 60 jaroj, li alte taksis la energion kaj gravan rolon de ĉina E-movado en la mondo, kaj esperis, ke la 8-a Azia Kongreso en 2015 okazos en tiu regiono de Ĉinio.

La kongreso ricevis pli ol 30 salutleterojn el esperantaj organizoj enlandaj kaj eksterlandaj. Renato Corsetti, eksprezidanto de UEA, en la letero skribis, ke ĉinaj esperantistoj donas ekzemplon de diligento kaj estas vivanta ekzemplo de la "diligenta kolegaro", kiu estas citita el la poemo "La Espero" de Zamenhof, ankaŭ sendis siajn gratulajn leterojn Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj aliaj E-organizoj.

La kongreso enhavas temo-diskutadon, kunsidon de junuloj kaj de fervojistoj kaj diskuto pri ĝemelaj urboj. En la tema diskutado de la kongreso ĉinaj esperantaj instruistoj, sinjoro HORI Yasuo, kaj profesoro Ronald J Glossop interŝanĝis siajn spertojn en E-lernigado kaj prezentis siajn atingojn en tiu flanko. En diskuto de junuloj, Gong Xiaofeng, ILEI-sekciestro en Ĉinio prezentis la instruajn metodojn de Dennis Keefe por praktiki parolan Esperanton per bildoj. En la fervojista kunsido, Han Zuwu, prezidanto de la Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio, konigis al la ĉeestantoj sian vojaĝon al Bulgario por partopreni la 63-an Esperanto-kongreson de Internacia Fervojista Federacio. En diskuto pri ĝemelaj urboj, Wu Guojiang, vicprezidanto de Liaoning-a Esperanto-Asocio prezentis la historion de la projekto de Ĝemelaj Urboj kaj elmetis sian Tri "P" Ideoj, nome Propono, Partopreno kaj Praktikado, tio signifas ke por disvastigi la movadon de starigo de rilatoj inter ĝemelaj urboj, la projekto bezonas proponojn kaj partoprenon de e-istoj, nur post ilia partoprenado kaj praktikado la afero povas disvastiĝi rapide. En prelego de tradicia kulturo, sinjoro Teruhiro SASAKI faris prelegon pri traduko de klasikaj

literaturaĵoj en Esperanto. 12 studentoj de Song Ping el Heilongjiang-a Scienc-teknologia Instituto faris prelegojn pri sia lernado de Esperanto kaj la impresoj pri Admonoj al Disĉiplo. Ye Nianxian donis prelegon pri la historio de Esperanto al esperantaj komencantoj.

La EKNIMĈ okazis en ĉiu dua jaro en malsama urbo de tiu regiono celante akceli la divolviĝon de Esperanto-movado en tiu regiono. Lastatempe en tiu regiono aktivis lernigado de Esperanto precipe en universitatoj, post klopodo de e-istoj kaj e-organizoj en tiu regiono oni malfermis Esperanto-kursojn en Liaoning-universtato, Scienc-teknika Universitato en Heilongjiang, Liaodong-universitato k.a. Dank' al tio, kelkcent lernantoj esperantistiĝis, tamen samtempe evidentiĝis la problemo, ke kial daŭrigi la lernadon de tiuj lernantoj, alivorte, kiel restigi ilin en esperantujo? Ĉu la lernigo aŭ lernado jam sufiĉas? Eble la ŝlosilo kuŝas en la temo de ĉi tiu kongreso - instruado kaj aplikado. Nur apliki nian lingvon estas efika metodo en ĝia disvastigo, kaj fari ĝin viva kaj esprimriĉa.

(Chen Ji kaj Jin Chenxi)

Scienc-populariga Semajno en Dandong, Liaoning-provinco

La 18-an de junio 2010 Dandong-a Esperanto-Asocio (DEA) partoprenis en la "Scienc-populariga Semajno en Dandong, Liaoning-provinco". En la pasintaj ok jaroj ĉiujare okazis la Semajno. Kaj DEA ĉiuokaze partoprenis ĝin por disvastigi Esperanton en tiu regiono.

En ĉi-jara aktivado DEA konigis al vizitantoj bazajn sciojn pri Esperanto kaj kuraĝigis ilin partopreni en la Sesa Esperanta Kongreso de Nordoriento kaj Interna Mongolio de Ĉinio okazonta fine de aŭgusto en la urbo. Sub ilia influo 8 vizitantoj aliĝis al la asocio kaj la okazonta kongreso.

(el retejo de Dandong)

HUBEI

Jarkunveno de ĉinaj E-komercistoj en Huangshi

Inter la 18a kaj 19a de septembro 2010 okazis la 4a jarkunveno de ĉinaj E-komercistoj en

Huangshi, Hubei-provinco.

Posttagmeze de la 18a Yu Ximei, vicprezidanto de klubo de ĉinaj E-komercistoj, prezidis la kunvenon. La ĉeestantoj diskutis pri ekonomio kaj kapitala cirkulado en ĉina kaj eksterlanda esperantujoj kaj atingis komunajn konojn.

Matene de la 19a Zhao Chenghua, konstanta vicprezidanto de klubo de ĉinaj E-komercistoj, prezidis kunvenon. Subskribis intencajn komercajn interkonsentojn Da Vinci Importa kaj Eksporta Kompanio, Brazilo kaj Shuilian-a Limigita Kompanio pri Matracoj, Suzhou; Mixueer-a Teknologia Kompanio, Xiamen kaj Butiko Bela Interkonsento, Huangshi; Xien-a Komerca Kompanio Limigita, Xiamen kaj Zhiyuan-a Teknologia Entreprena Kompanio, Wuhan; Xien-a Komerca Kompanio Limigita, Xiamen kaj komerca sekcio de Guiyang-a E-asocio;

Ĉielismo, prezidanto de la klubo de ĉinaj E-komercistoj, anoncis, ke la venonta jarkunveno de ĉinaj E-komercistoj okazos en Ŝanhajo, 2011;

Ĉielismo faris resumon pri la atingoj de la ĉinaj E-komercistoj en la pasinta jaro kaj anoncis listojn de novaj konstantaj komitatanoj kaj komitatanoj.

Posttagmeze ĉeestantoj vizitis entreprenan bazon de esperantistoj kaj naciaj minejan parkon, kaj vespere Huangshi-a E-asocio bankede regalas la ĉeestantojn.

(Ĉielismo)

SHANDONG

Prelego pri Esperanto en la Zaozhuang-a Profesia Instituto

Posttagmeze de la 4-a de novembro 2010 okazis en la Zaozhuang-a Profesia Instituto prelego pri Esperanto. S-ro Semio el la Zaozhuang-a Universitato faris prelegon kun la titolo Esperanto – internacia lingvo por la harmonia socio. La



prelegon aŭskultis 26 gestudentoj. Kaj la agadon prezidis s-ro Zhao Yaping, vicĝenerala sekretario de la Zaozhuang-a Esperanto-Asocio.

Krome, la Zaozhuang-a Profesia Instituto decidis fondi baldaŭ du organizojn por nia kara lingvo Esperanto, nome la Studento-Societo de Esperanto kaj filio de la Zaozhuang-a Esperanto-Asocio.

(Sun Mingxiao)

Esperanto-kurso por studentoj en la Zaozhuang-a Profesia Instituto



La 23-an de novembro 2010 komenciĝis en la Zaozhuang-a Profesia Instituto la Esperanto-kurso por studentoj funkciigita de la

Esperanto-Societo de Studentoj de la instituto.

La kurson gvidas s-ro Zhao Yaping, vicĝenerala sekretario de la Zaozhuang-a Esperanto-Asocio kaj instruisto de la Zaozhuang-a Profesia Instituto.

(Semio)

Preparo por establo de Esperanta Amikeco-Arbaro kaj Internacia Esperanto-Muzeo



Esperanto-Movado pli kaj pli famas en Zaozhuang, Ĉinio. Post sukcesa gastigo de regula Internacia Festivalo de Esperanto, Zaozhuang-a Esperanto-Asocio havas novan planon por nia movado kaj kulturo.

Laŭ la decido de 2010-jara kunsido de komitatanoj de Zaozhuang-a Esperanto-Asocio oni preparas establi organizojn Esperanta Amikeco-Arbaro kaj Internacia Esperanto-Muzeo. Oni nun komencas serĉi oficejojn por la du organizoj.

(Sun Mingxiao)

ĈINA SEKCIO DE ILEI

Seminario de ĉina sekcio de ILEI en Taiyuan



La 11an de aŭgusto fermiĝis la 10-taga seminario de ĉina sekcio de ILEI en Taiyuan. Aliĝis 59 personoj el 5 landoj, inkluzive de du personoj, kiuj ne povis fizike partopreni sed subtenis ĝin finance kaj morale. 10 enlandaj esperantistoj rete ĉeestis la seminarion.

En fakkunsido s-ino Gong Xiaofeng, prezidanto de la ĉina sekcio de ILEI, faris laborraporton de ĉina sekcio de ILEI, kaj anoncis, ke de la 8a ĝis la 15a de aŭgusto 2011 en Tianjin okazos la venonta seminario de la sekcio kaj samtempe okazos la 1-a seminario de ĉina, japana kaj korea sekcioj de ILEI. La kunsido ankaŭ elektis Liu Baoguo kiel vicprezidanton kaj sekretarion de ĉina sekcio de ILEI, Zou Jin kasiston, Cui Jiayou kaj Xiong Hui redaktorojn de ĝia revuo. La kunsido planas, ke la sekcio starigos retpaĝaron kaj revuon, kaj kreskigos ĝiajn membrojn.

Dum la seminario okazis 4 kursoj por infanoj, gestudentoj, komencantoj kaj progresantoj, 13 prelegoj pri edukado kaj E-metodoj, 4 raportoj pri E-instruado en ĉinaj kaj japanaj lernejoj, 2 demonstraĵoj kursoj, konigo de internacia ekzameno de Esperanto, interkona vespero, amuza vespero, arta vespero, ekskursoj, reta prelego, reta babilado per skajpo, reta transsendo de la seminario.

En la publika prelego al la socio, pli ol 100 lokaj interesitoj, gepatroj de infanoj ĉeestis. 6 eksterlandaj kaj 1 ĉina instruistoj faris paroladojn pri lingvoj.

Sendis al la seminario gratul-mesaĝojn s-ro Stefano, prezidanto de ILEI, s-ino Mirejo, prezidanto de

Internacia Ekzamena Komisiono kaj svisa sekcio de ILEI, s-ro LEE Jung-kee, korea sekciestro de ILEI, kaj multaj enlandaj E-asocioj kaj organizoj.

Post la seminario Gong Xiaofeng, Jeong-Yeol Jang el suda Koreio kaj Ronald J. Glossop el Usono vizitis ĈEL kaj la redakcion de reta El Popola Ĉinio en Pekino.

(Liu Zijia)

ĈINA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO

Jarkunveno de Ĉina Fervoja Esperanto-Asocio



En la 21-a de aŭgusto 2010 okazis Jarkunveno de la Ĉina Fervoja Esperanto-Asocio (ĈFEA) en la urbo Dandong, Liaoning-provinco en nordorienta Ĉinio ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Nordkoreio. Partoprenis en la jarkunveno pli ol 30 esperantistoj el la urboj Pekino, Tianjin, Kantono, Taiyuan, Meihekou, Hohhot, Baotou, Shenyang, Langfang, Dandong ktp. Inter la partoprenantoj estis s-ro Li Sen, honora prezidanto de ĈFEA, s-ino Tan Xiuzhu, eksprezidantino de la Ĉina Esperanto-Ligo, s-ro Yu Tao, ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj iuj famaj veteranoj en Ĉinio, kiuj forte subtenas ĈFEA.

S-ro Han Zuwu, prezidanto de ĈFEA, prezidis la jarkunvenon. En la kunveno vicprezidanto s-ro Xiao Ke prelegis pri la ekspresa fervojo en Ĉinio. La tekniko de la ĉina ekspresa fervojo antaŭeniras en la mondo. La motorvagonaroj "CRH" (Harmonio) kun la rapideco de 350 km/h estas arope produktitaj de Ĉinio mem, kiuj bone funkcias sur la fervojlinio de Pekino al Tianjin kaj tiu de Wuhan al Kantono.

S-ro Han Zuwu faris koncizan resumon pri la laboro de ĈFEA, raportis pri la 62-a IF-kongreso en Sofio de Bulgario per multimedia aparato. La raporto estis aplaudita de ĉiuj ĉeestantoj. Li ankaŭ alvokis al

la ĉinaj fervojistoj lerni Esperanton pli diligente kaj uzi tiun ĉi lingvon ne nur en la fervoja fako sed ankaŭ en aliaj kampoj. Krome, la ĉeestantaj fervojisto-samideanoj diskutis pri la ebleco gastigi la 66-an kongreson de IFEF en Ĉinio en 2014.

Estas menciinde, ke la 88-a naskiĝtago de s-ro Li Sen en la 29-a de aŭgusto estis celebrata ne nur de fervojistoj, sed ankaŭ de ĉiuj ĉeestantaj esperantistoj en Ĉinio. En la kunveno oni gratulis s-ron Li Sen pere de artikoloj, noveldonita libro kaj gratulkartoj kun plej sinceraj deziroj al li: feliĉon, sanon kaj longvicon. S-ro Li Sen diris, ke li dankis ĉiujn pro la gratuloj, kaj li daŭrigos sian laboron en la Esperanto-movado kaj dediĉos sian tutan vivon al la Esperanto-movado.

(Han Zuwu)

Dua premio al ĉina e-isto en la 12-a Internacia Fotokonkurso

Ĉina e-isto Xu Jingke gajnis la duan premion en la 12-a Internacia Fotokonkurso organizita de redakcio



La verko de la unuaklasa premio En Bicikla Speguleto

La Ondo de Esperanto. La konkurso ricevis 65 verkojn de 14 aŭtoroj el 11 landoj: Brazilo, Ĉilio, Ĉinio, Hungario, Germanio, Italio, Kanado,



Verko de Xu Jingke Rivero sub la Lunbrilo Zigzagas

Pollando, Rumanio, Ruslando kaj Serbio. Fine la foto "En bicikla speguleto" de Barbara Chodera el Pollando gajnis la unuan premion kun €50 kaj abono de *La Ondo de Esperanto* por unu jaro. Ĉina e-isto Xu Jingke pro sia verko *Rivero sub la lunbrilo zigzagas* gajnis la duan kaj la laŭreatoj de la tria premio estas Joaquim João Mariano el Brazilo pro *Disĵetita akvofalo*; Geoffrey Greatrex el Kanado pro *Eiĥŝtata klostro*; Vladimir Merkulov el Ruslando pro *Korteto en Montenegro*.

(Wei Shan)